



# Pripensi Spiritan Vivon

Ruhi-Instituto



Libro 1



Pripensi  
Spiritan Vivon

Ruhi Instituto

## Books in the Series:

Below are the current titles in the series designed by the Ruhi Institute. The books are intended to be used as the main sequence of courses in a systematic effort to enhance the capacity of youth and adults to serve their communities. The Ruhi Institute is also developing a set of courses that branch out from the third book in the series for training Bahá'í children's class teachers, as well as another set from Book 5 for raising up animators of junior youth groups. These, too, are indicated in the list below. It should be noted that the list may undergo change as experience in the field advances, and additional titles will be added as a number of curricular elements under development reach the stage where they can be made widely available.

- Book 1     *Reflections on the Life of the Spirit*
- Book 2     *Arising to Serve*
- Book 3     *Teaching Children's Classes, Grade 1*  
              *Teaching Children's Classes, Grade 2 (branch course)*  
              *Teaching Children's Classes, Grade 3 (branch course)*  
              *Teaching Children's Classes, Grade 4 (branch course)*
- Book 4     *The Twin Manifestations*
- Book 5     *Releasing the Powers of Junior Youth*  
              *Initial Impulse: The first branch course of Book 5*  
              *Widening Circle: The second branch course of Book 5*
- Book 6     *Teaching the Cause*
- Book 7     *Walking Together on a Path of Service*
- Book 8     *The Covenant of Bahá'u'lláh*
- Book 9     *Gaining an Historical Perspective*
- Book 10    *Building Vibrant Communities*
- Book 11    Material Means
- Book 12    (forthcoming)
- Book 13    *Engaging in Social Action*
- Book 14    (forthcoming)

Copyright © 2020 by the Ruhi Foundation, Colombia  
All rights reserved. Edition 4.1.1.PE published in June 2020

Originally published in Spanish as *Reflexiones sobre la vida del espíritu*  
Copyright © 1987, 1995, 2008, 2020 by the Ruhi Foundation, Colombia  
ISBN 978-958-59880-3-3

Permission to translate this book in Esperanto has been granted to Bahaa Esperanto-Ligo by the Ruhi Institute.

Ruhi Institute  
Cali, Colombia  
Email: [instituto@ruhi.org](mailto:instituto@ruhi.org)  
Website: [www.ruhi.org](http://www.ruhi.org)

Bahaa Esperanto-Ligo  
Eppsteiner Str. 89  
DE-65719 Hofheim-Langenhain  
T. +49-(0)6192-9929-16  
F. +49-(0)6192-9929-99  
[bel@bahai.de](mailto:bel@bahai.de)  
[www.bel.bahai.de](http://www.bel.bahai.de)

## Enhavo

Kelkaj pensoj por la monitoro	v
Kompreni la Bahaajn Skribojn	1
Preĝado	13
Vivo kaj Morto	29



## Kelkaj pensoj por la monitoro

La nombro da lokoj tutmonde kie oni studas *Pripensi Spiritan Vivon*, la unuan libron de la ĉefa kursoserio, kiun ofertas la Ruhi-Instituto, kreskas jam de multaj jaroj. Plej ofte la studmaterialon legas kaj diskutas grupo da amikoj, kiuj aŭ formas regule renkontiĝantan studcirklon, aŭ renkontiĝas okaze de iu kampanjo aranĝita por intensa studado, aŭ kunvenas en feria tendaro. Kia ajn estas la okazo: unu membro de la grupo funkcias kiel monitoro. La rilato inter la monitoro kaj la ceteraj partoprenantoj ne estas ia instruistolernantoj rilato; ĉiuj konscie engaĝiĝas en procezo per kiu ĉiu provas lerni. Sed ankaŭ la monitoro ne estas indiferenta kaj pasiva diskutgvidanto. Trapasinte sufiĉan nombron da kursoj de la serio kaj farinte la servo-agojn, al kiuj ili instigas, kapablas li aŭ ŝi asisti ĉiun membron de la grupo atingi la celon de la studata materialo. Por tiuj agantaj kiel monitoro de Libro 1 eble utilas de tempo al tempo relegi la konceptojn prezentitajn en tiu ĉi enkonduko.

Al ĉi tiu unua instituta kurso tutmonde venas partoprenantoj diversfonaj. Iuj jam estas membroj de la bahaa komunumo, kiuj esperas plibonigi sian kapablon servi la Kozon en kiu ili membriĝis. Aliaj konsideras la kurson la komencon de sia esplorado de la Bahaa Kredo kiel religio. Ankoraŭ aliajn allogas la bahaaj idealoj kaj ili deziras konatiĝi kun la celoj kaj agadoj de la komunumo. Kaj estas kreskanta nombro da precipe gejunuloj, por kiuj la kurso estas la unua paŝo je ilia deziro pligrandigi siajn kapablojn servi la socion – ofte pere de unu aŭ alia programo ofertata de la bahaa komunumo.

Ekde la komenco estu klare por ĉiu partoprenanto ke la kursoj de la Ruhi-Instituto konsistigas padon de servado al la homaro, kiun ni ĉiuj iras per propra rapideco kaj samtempe tiel ke ni asistas aliajn kaj estas asistataj de aliaj. Paŝadi sur tiu ĉi pado implicas plenumi duoblan moralan celon: klopodi mem spirite kaj intelekte kreski kaj kontribui al la transformado de la socio. Por progresi sur tiu ĉi pado necesas evoluigi aron da kapabloj, por kiuj bezonatas kompreno kaj scioj, spiritaj kvalitoj kaj laŭdindaj sintenoj same kiel aro da povoj kaj kompetentoj. La sciofontoj el kiuj ĉerpas la libroj de la Instituto estas unuflanke la instruoj de la Bahaa Kredo kaj aliflanke la spertoj de la tutmonda bahaa komunumo akumulitaj je la akcelado de materie kaj spirite prospera civilizacio. La Instituton inspiras la vizio de Bahá'u'lláh pri kio ni povas individue fariĝi kaj pri la civilizacio, kiun ni povas starigi. La premiso estas ke ĉiuj partoprenantoj, sendepende de sia fono, pretas propriigi al si tiun ĉi vizion, kiu en ĉiu ĉapitro de ĉiu libro de la kursoserio eksplicite aperas.

En mondo en kiu kredoj kaj ideologioj klopodas utiligi ajnan rimedon por akiri novajn adeptojn, eble iu ne konanta la Kredon havas bazajn demandojn pri la intencoj de la Ruhi-Instituto, precipe: “Ĉu oni petos min ŝanĝi mian religion?” aŭ “Ĉu oni petos min aliĝi al religio?” Tiaj demandoj donos al la monitoro ŝancon klarigi la celon de la kursoserio kiel supre skizitan. La monitoro eble volas aldoni ke, kvankam estas nature ke bahaanoj avidas bonvenigi siajn amikojn aliĝi al la komunumo, iliaj propraj instruoj malpermesas al ili sian Kredon altrudi. Iradi la padon de l' servado, kiun alirebligas la institutaj kursoj, alvokas al ĉiam pli profunda kompreno de la instruoj de Bahá'u'lláh, kiujn la studmateri-

aloj klopodas senambigue prezenti. Akcepto kaj kredo estas aferoj, kiujn ĉiu individuo devas mem libere kaj sen ia premo pripensi kaj kontempli.

Sekve do ne povas surprizi ke tiu ĉi unua libro komenciĝas per la temo komprenado, kiu estas tiel kerna por ĉiuj libroj de la serio. Legi la Sanktajn Verkojn tamen ne estas same kiel legi la multajn milojn da paĝoj, kiujn iu persono dum sia vivo tralegas. Kaj la celo de la ĉapitro “Kompreni la Bahaajn Skribojn” estas nutri la kutimon ĉiutage legi erojn de la Sanktaj Tekstoj kaj mediti pri ilia signifo – kutimo, kiu multe helpas la partoprenantojn kiam ili ekiras la padon de l’ servado. Por asisti ilin je ilia studado la monitoro devas profunde pensadi pri kiel oni ion komprenas.

En la Bahaaj Skriboj troviĝas profundaj spiritaj veroj, kaj eĉ kiam ni klopodas avanci en nia kompreno de ilia senlima signifo, ni scias ke neniam ni povos atingi definitivan finon. Ni ĝenerale akiras bazan komprenon de la senpera signifo de iu teksto kiam unufoje ni ĝin legas. Kaj Sekcio 1 de la ĉapitro tion prenas kiel deirpunkton. Tiel, leginte la citaĵon “Eblas plibonigi la mondon per puraj kaj bonaj agoj, per laŭdinda kaj deca konduto”, la partoprenantoj estas simple demandataj: “Kiel eblas plibonigi la mondon?” Unuavide la plimulto de la tiaspecaj demandoj kaj ekzercoj ŝajnas esti tro simplaj. Sed jaroj da sperto ŝajne pravigas la decidon de la Instituto komenci tiel. Ni ĉiuj devas esti rememorigataj, ke je sia hasto trovi la diversajn tavolojn da vero en iu citaĵo, la menso ne preteratentu ĝian evidentan signifon. Atenti pri tiu ĉi unua komprenonivelo montriĝas esenca ankaŭ por grupa interkonsiliĝo; ĝi plifortigas unuecon de la pensado, kiu facile atingeblas kiam personaj opinioj povas luminiĝi per Dia saĝo.

Gravas noti tie ĉi, ke kompreni la evidentan signifon de la plejmulto de la citaĵoj ne profitas el longa diskutado pri unuopaj vortoj ekster la kunteksto. Malgraŭ tio eble tamen necesas foje por iu grupo rigardi vortsignifon en vortaro. Pli fruktodone tamen estas por la partoprenantoj lerni kiel dedukti la sencon de la vortoj el kompletaj frazoj kaj alineoj.

Por ke kompreno vastiĝu preter la sferon de la senpera signifo povas utili ekzemploj montrantaj kiel konkrete esprimiĝas certaj ideoj. Ĉio tiurilate postulata estas fari simplajn ekzercojn. En Sekcio 2 ekzemple la partoprenantoj estas petataj decidi, konsiderante la citaĵojn ĵus de ili legitajn, ĉu certaj trajtoj estas laŭdindaj. En simila ekzerco en Sekcio 4 ili estas instigataj nomi kvin virtojn kaj poste decidi ĉu eblas akiri iujn el ili se mankas veramo, kiu estas karakterizita en la Skriboj kiel “la fundamento de ĉiuj homaj virtoj”.

Por atingi sian celon la ĉapitro postulas avancon je la kompreno defiante la partoprenantojn pripensi iujn implicojn de la prezentataj citaĵoj. En Sekcio 2 estas postulata de ili decidi ĉu la aserto “Estas tiom malmulte da bonuloj en la mondo, ke iliaj agoj havas neniun efikon” ĝustas. Tie ĉi la intenco ne estas ekhavi nuran opinion. La monitoro devas paŭzi kaj demandi la partoprenantojn pri la kialo de ilia respondo. La grupo konkludu ke la aserto nepre devas esti falsa ĉar ĝi kontraŭdiras la unuan citaĵon en la antaŭa sekcio. La demando ĉu bahaano povas konfesi siajn pekojn al alia persono ankaŭ estas ekzemplo de tia ekzerco. Ĝi referas al la malpermeso en la instruoj konfesi siajn pekojn por akiri absolvon, io kion, kvankam ne eksplicite menciita en iu el la studataj citaĵoj, eblas konkludi esplorante la signifon de la verso “Taksu vin mem ĉiutage antaŭ ol vi estos vokita al juĝo.”

Neniel la ekzercoj en la ĉapitro provas ampleksi la tutan signifogamon entenatan en la konsiderataj citaĵoj. Demando kiun ĉiu monitoro devas kontempli estas kiom da diskutata-



do okazu pri la ekzercoj. Jen gravas konscii ke longigi diskutadon per la enkonduko de multaj rilataj sed periferiaj konceptoj emas malgrandigi la efikon de la studmaterialo. Ĉiu grupo devas establi akcepteblan ritmon de progreso; la partoprenantoj klare sentu ke ili konstante avancis laŭ siaj propraj eblecoj. La monitoro tamen devas resti atenta por eviti ke sekcioj estas trairataj tro rapide kaj supraĵe sen pripensema analizado de la ekzercoj; grupoj kiuj kontentigis sin per nur simpla respondado de la demandoj neniam atingis daŭrajn rezultojn.

Unu fina punkto meritas mencion: Estas la devo de la monitoro certigi ke ĉiu ano de la grupo restas okupiĝanta pri la lernprocezo nutrata de la studmaterialo. Ofte la defio estas vekti la partoprenemon sen iel premi kaj sen postuli de iu paroli. Dekomence oni konscii ke nur malofte la celon oni atingas per simplaj demandoj kiel “Kion tio ĉi signifas por vi?” Tiaj demandoj emas redukti sciojn kaj verojn al nuraj opinioj. Kaj tiam montriĝas malfacile krei etoson en kiu interkonsiliĝo inter la membroj de la grupo efektive generas pli profundan komprenon.

La dua ĉapitro de la libro same kiel la unua okupiĝas pri kutimo esenca por spirita vivo: regule preĝi. En la unua sekcio ĝi eksplicite traktas la koncepton de la “pado de l’ servado”, klarigante ke por paŝadi laŭ tiu pado devas nin penetri duobla celo. La partoprenantoj esploras unuan aron da citaĵoj, kiuj ofertas ekkoni la trajtojn de ĉi tiu celo, temo kiu estos pli profunde traktata en estontaj kursoj.

Antaŭ la fono de tiu ĉi temo la ĉapitro ekas esplori la signifon de preĝado. Ĝi aplikas pritrakton kiu similas tiun priskribitan en la antaŭaj alineoj. Demandoj kaj ekzercoj estas formulitaj por pliprofundigi la komprenon de la signifo de citaĵoj el la studataj Skriboj. Dum la grupo antaŭeniras tra la ĉapitro, devas la monitoro dispeli dubojn pere de la analizado de konceptoj enradikiĝintaj en interpretoj kaj praktikoj de la pasinteco. En iuj tradicioj iom post iom ritoj kaj formoj flankenpuŝis la gravecon de la interna stato kaj sekve multaj ignoras la bezonon de preĝado, kiu, por la homa animo, ne estas malpli esenca ol estas manĝaĵo por nutri la korpon.

Tial la ĉapitro antaŭ ĉio aspiras vekti en la partoprenantoj la deziron “konversi kun Dio” kaj alproksimiĝi al Li. Inter la traktataj konceptoj troviĝas kion vere signifas eniĝi en preĝostato, la sinteno de nia koro kaj nia menso kiam tion ni faras, kaj la kondiĉoj kiuj estu kreitaj en nia ĉirkaŭaĵo – ĉu ni estas sola aŭ en iu renkontiĝo. Efektive, post iom trakti la fortojn kiujn generas komuna adorado, la partoprenantoj estas petataj konsideri mem gastigi kunvenon de preĝado kaj devotado.

Studi la trian ĉapitron de la libro, “Vivo kaj Morto”, plifortigos, tio estas la espero, la sindevontigon iri la padon de l’ servado kaj dotos tion per pli profunda signifo. Servado en tiu ĉi mondo plej bone kompreneblas en la plenarysa kunteksto de la vivo, kiu etendiĝas preter nia Tera ekzisto kaj pludaŭras eterne kiam nia animo progresas tra la mondoj de Dio. En edukprocezo, kontraste al teknika trejnado, la partoprenantoj ĉiam pli konsciiĝu pri la signifo kaj graveco de tio kion ĉiutage ili estas farantaj. La sperto indikas ke nur se kreskas tia konscio ekkonsideros ili sin mem kiel esti aktiva, responsa “posedanto” de la propra lernado.

Ĉiu sekcio de la ĉapitro malfermiĝas per unu ĝis tri citaĵoj el la Bahaaj Skriboj kion sekvas kelkaj ekzercoj. La lingvaĵo de la citaĵoj en tiu ĉapitro estas pli postula ol tiu en la du antaŭaj. Kompreneble ne necesas por la grupo okupiĝi pri malfacilaj vortoj; la moni-

toro certe deziros certigi ke ĉiu komprenas la kernan ideon traktatan en ĉiu sekcio, kio estas precize kion provas atingi la ekzercoj.

Pro la karaktero de la temo malmultas ekzercoj donantaj konkretajn ekzemplojn. La plimulto moviĝas sur koncepta nivelo. Indas noti ke iujn de la demandoj en la ekzercoj ne eblas respondi rapide aŭ unusignife. Ili troviĝas tie por plikonsciigi pri la temo; se la partoprenantoj simple pripensas tiujn demandojn, la lernocelo jam plenumiĝas.

La unuaj sekcioj koncentriĝas je la rilato inter la animo kaj la korpo, kiuj kune konsistigas homan estaĵon en tiu ĉi ekzistosfero. La centra koncepto prezentata en ĉi tiuj sekcioj estas ke la animo ne estas fizika ento; ĝia asociiĝo kun la korpo kompareblas kun tiu de lumo aperanta en spegulo. Nek la polvo kovranta ĝian surfacon nek la fina detruo de la spegulo povas trafi la splendoron de la lumo mem. La morto estas nur kondiĉoŝanĝiĝo okazanta kiam la asociiĝo inter la korpo kaj la animo rompiĝas; poste la animo eterne progresos direkte al sia Kreinto.

La ĉapitro sekve turniĝas al kio estas la celo de la vivo: ekkoni Dion kaj atingi Ties ĉeston. La diskutado ĉi tie okupiĝas pri du vastaj temoj. La unua estas la celo de nia vivo en ĉi tiu mondo kaj la dua estas la vojo de la animo post la morto. La animo estas signo de Dio kaj povas reflekti ĉiujn nomojn kaj atributojn de Dio. Sed la kapabloj de la homo estas latentaj kapabloj; eblas ilin evoluigi nur helpe de la Manifestiĝoj de Dio, tiuj sanktaj Estaĵoj Kiuj de tempo al tempo venas por gvidi la homaron. Pere de la spirita edukado, kiun Ili donas, riveliĝas la trezoroj kaŝitaj en ni.

Pri la vojo de la animo post la morto estas prezentata aro da ideoj por ke la partoprenantoj ilin kontem plu: Ke tiuj fidelaj al Dio atingos veran feliĉon; ke neniu el ni povas iam scii kiel finiĝos lia/ŝia vivo kaj ke sekve ni reciproke pardonu nin kaj ne sentu nin pli supera ol aliaj; ke en la sekvonta mondo, kiel en tiu ĉi, la animo progresados plu kaj ke la spiritaj kapabloj ĉi tie evoluigitaj de ni helpos kaj asistos nin tie; ke en la transaj regnoj ni rekonos niajn amatojn, memoros nian vivon en ĉi tiu mondo kaj ĝuos kunestadi kun sanktaj kaj konsekritaj animoj.

La ĉapitro finiĝas per citaĵoj el la Skriboj de Bahá'u'lláh kiuj certigas nin pri la benoj de la venonta mondo kaj urĝas nin ne permesi ke la ŝanĝiĝoj kaj hazardoj de ĉi tiu vivo nin malĝojigu. La partoprenantoj estas fine petataj pripensi kion tio studita implicas por ilia propra vivo.



# Kompreni la Bahaajn Skribojn

Celo

Plifortikigi la kutimon ĉiutage  
legi erojn el la Sanktaj Skriboj  
kaj pripensi ilian signifon



## SEKCIO 1

La celo de tiu ĉi ĉapitro estas asisti vin evoluigi kaj fortikigi la kutimon ĉiutage legi erojn el la Sanktaj Skriboj kaj pripensi ilian signifon. La ĉapitro komenciĝas per la simpla ekzerco ke vi estas petata legi unufrazan eldiron el la Skriboj kaj respondi demandon por kiu la eldiro mem estas la respondo. Kvankam simple farebla tiu ĉi ekzerco helpas al vi pripensi la signifon de la cititaj eldiroj kaj ilin parkerigi.

**“Eblas plibonigi la mondon per puraj kaj bonaj agoj, per laŭdinda kaj deca konduto.”<sup>1</sup>**

1. Kiel eblas plibonigi la mondon? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

**“Gardu vin, ho popolo de Bahá’, ke ne vi paŝu laŭ la vojoj de tiuj, kies vortoj malkongruas kun iliaj agoj.”<sup>2</sup>**

2. Laŭ kies vojoj ni ne paŝu? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

**“Ho filo de l’ Esto! Taksu vin mem ĉiutage antaŭ ol vi estos vokita al juĝo...”<sup>3</sup>**

3. Kion ni faru antaŭ ol esti vokata al juĝo? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

**“Diru, ho gefratoj! Lasu farojn, ne vortojn, esti via ornamo.”<sup>4</sup>**

4. Kio estu nia vera ornamo? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

**“Sanktaj vortoj kaj puraj kaj bonaj agoj leviĝas al la ĉielo de dia gloro.”<sup>5</sup>**

5. Kion faras sanktaj vortoj kaj puraj kaj bonaj agoj? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

## SEKCIO 2

Sube troviĝas kelkaj ekzercoj rilate al la citaĵoj kiujn vi ĵus legis. Ili intencas helpi vin en via grupo pripensi plu la signifon de la citaĵoj. La ekzercoj ne estu plenumataj mekanike. Tio ne signifas, ke ĉiu ekzerco postulas multan pridiskutadon. Se tamen la ekzerco montriĝas defia, la monitoro de via grupo asistos vin por funde studi ĝin.

1. Kiam io estas “laŭdinda”, ĝi meritas aprobon kaj favoron. Kio sekva estas laŭdinda?  
 Esti bona laboranto.  
 Respekti aliajn.  
 Esti lernema.  
 Esti mensogulo.  
 Esti pigra.  
 Servi al aliaj.
2. Kion signifas “antaŭ ol vi estos vokita al juĝo”? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
3. Kiuj el la sekvaj asertoj estas ĝustaj:  
 Estas tiom malmulte da bonuloj en la mondo, ke iliaj agoj havas neniun efikon.  
 Io ĝustas kiam ĝi akordas kun la opinioj de aliaj homoj.  
 Io ĝustas kiam ĝi akordas kun la instruoj de Dio.
4. Kiuj el la jenaj estas puraj kaj bonaj agoj?  
 Zorgi pri infanoj kaj instrui ilin.  
 Ŝteli.  
 Preĝi por la progreso de aliaj.  
 Iomete mensogi por elturniĝi.  
 Helpi aliajn kaj atendi rekompencan.
5. En kiuj el la sekvaj situacioj la vortoj malkongruas kun la ago?  
 Iu ripetadas ke ni ĉiuj estu unuigitaj sed kondutas tiel ke li/ŝi kaŭzas konfliktojn.  
 Iu laŭdas la valoron de ĉasta vivo sed seksume rilatas ekster sia geedzeco.  
 Iu foje drinkas alkoholon sed pretendas sekvi religian kredon malpermesanta drinki.  
 Iu pledas por la egaleco inter viroj kaj virinoj sed kiel dunganto pagas malpli al virinoj por la sama laboro.
6. Ĉu permeseblas al bahaano konfesi siajn pekojn al alia persono? \_\_\_\_\_

7. Kion li/ŝi faru anstataŭ konfesado? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
8. Kion signifas “la ĉielo de dia gloro”? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
9. Kiel malbonaj agoj efikas je la mondo? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
10. Kiel malbonaj agoj efikas je tiu kiu tiel agas? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

### SEKCIO 3

Nun legu kaj pripensu la sekvajn citaĵojn el la Skriboj; provu poste ilin parkerigi.

**“Amo al la vero estas la fundamento de ĉiuj homaj virtoj.”<sup>6</sup>**

1. Kio estas la fundamento de ĉiuj homaj virtoj? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

**“Sen veremo por ajna animo maleblas progreso kaj sukceso – en ĉiuj mondoj de Dio.”<sup>7</sup>**

2. Kio estas neeblo sen veremo? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

**“Nobligu vian langon, ho homoj, per vero kaj ornamu vian animon per honesto.”<sup>8</sup>**

3. Per kio ni nobligu nian langon? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
4. Per kio ni ornamu nian animon? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

**“Estu via okulo ĉasta, via mano fidela, via lango verema kaj via koro iluminita.”<sup>9</sup>**

5. Kia estu nia okulo? \_\_\_\_\_ Nia mano? \_\_\_\_\_  
Nia lango? \_\_\_\_\_ Nia koro? \_\_\_\_\_

**“Tiuj, kiuj restadas en la tabernaklo de Dio kaj establiĝis sur la seĝoj de eterna gloro, rifuzos, eĉ se mortus ili pro malsato, etendi sian manon por kontraŭleĝe preni la propraĵon de sia najbaro, kia ajn malnobla kaj malinda tiu eble estas.”<sup>10</sup>**

6. Kion ni rifuzu fari, eĉ se ni mortus pro malsato? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

#### SEKCIO 4

Kiel verŝajne vi rimarkis en Sekcio 2, kelkaj el la ekzercoj en tiu ĉi ĉapitro postulas precizajn respondojn. Se en tiaj kazoj estas duboj pri la respondo, la monitoro de via grupo povos helpi vin kaj viajn kunpartoprenantojn veni al unuecaj konkludoj. Je aliaj ekzercoj la diskutado mem estas tio valora kaj neniam specifa respondo estas atendata. Sekve ekzerco 3 estas de la unua speco dum ekzerco 6 apartenas al la dua kategorio.

1. Veramo estas la fundamento de ĉiuj homaj virtoj. Citu kvin virtojn: \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
2. Ĉu ni povas akiri tiujn virtojn sen veramo? \_\_\_\_\_
3. Kiuj el la sekvaj eldiroj estas ĝustaj?
- \_\_\_ Persono povas esti justa, eĉ se li/ŝi mensogas.
  - \_\_\_ Iu, kiu ŝtelas, havas fidelan manon.
  - \_\_\_ Fidela mano neniam tuŝas tion, kio ne apartenas al ĝi.
  - \_\_\_ Rigardi pornografiaĵojn kontraŭas la konsilon de Bahá'u'lláh havi ĉastan okulon.
  - \_\_\_ Veramo signifas ne mensogi.
  - \_\_\_ Honesteco estas ornamo de la animo.
  - \_\_\_ Persono, kiu ne estas verama, povas progresi spirite.
  - \_\_\_ Jen kaj jen mensogi estas en ordo.
  - \_\_\_ Ŝteli estas akceptebla antaŭ Dio, se oni malsatas.
  - \_\_\_ Ne estas ŝteli sen la permeso de ĝia posedanto ion forpreni kun la penso ke oni ĝin pli poste redonos.
  - \_\_\_ Kiam ni agas honeste kaj estas justaj kaj veramaj, nia koro estas iluminita.
  - \_\_\_ Ne eblas sukcese negoci sen iom ruzi.
4. Ĉu eblas mensogi al si mem? \_\_\_\_\_



5. Kion ni perdas, kiam ni mensogas? \_\_\_\_\_
6. Kia estus la mondo, se ni ĉiuj estus veramaj kaj honestaj? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

## SEKCIO 5

Legu la sekvajn citaĵojn kaj provu ilin parkerigi. Parkerigi citaĵojn el la Skriboj estas tre rekomenca kaj vi forte klopodu tion fari. Kompreneble ne ĉiu kapablas facile parkerigi citaĵojn. Tamen, penadi tion fari helpas al ni la konceptojn gravuri en nian koron kaj menson kaj ilin esprimi per vortoj kiel eble proksimaj al tiuj de la origina teksto.

**“Lango afabla estas magneto por la koroj de l’ homoj. Ĝi estas la pano de l’ spirito, ĝi vestas la vortojn per signifo, ĝi estas la fonto el kiu fluas la lumo de l’ saĝeco kaj kompreno.”<sup>11</sup>**

1. Kiel oni povas priskribi afablan paroladon? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

2. Kiel afabla parolado efikas je vortoj? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

**“Ho vi amatoj de l’ Sinjoro! En tiu ĉi sankta Revelacio konfliktoj kaj malpacoj estas neniel permesitaj. Ĉiu agresanto senigas sin je la graco de Dio.”<sup>12</sup>**

3. Kio, laŭ tiu ĉi citaĵo, ne estas permesita en tiu ĉi Revelacio? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

4. Kion la agresanto faras al si mem? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

**“Absolute nenio povas en tiu ĉi Tago kaŭzi pli grandan nocon al tiu ĉi Kozo ol diskordo kaj malpaco, kvereloj, fremdiĝo kaj apatio inter la amatoj de Dio.”<sup>13</sup>**

5. Kiuj kondiĉoj kaŭzas la plej grandan damaĝon al la Kozo de Dio? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

**“Ne kontentiĝu per sole vorta elmonro de amikeco, sed ardu via koro per amo-plena afableco al ĉiuj, kiujn vi renkontos sur via vojo.”<sup>14</sup>**

6. Kia amikeco ne kontentigu nin? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

7. Kio radie ardu en nia koro? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

**“Kiam aperas militopenco kontraŭstaru ĝin per pli forta penso de paco. Penso de malamo devas esti detruata per pli potenca penso de amo.”<sup>15</sup>**

8. Per kio militopenco estu kontraŭata? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

9. Per kio estu detruata penso de malamo? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

## SEKCIO 6

Kun la supraj citaĵoj enmense faru la sekvajn ekzercojn:

1. Kiamaniere povas afabla parolado esti kiel magneto? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

2. Kiuj el la sekvaj eldiroj venas de afabla lango?

\_\_\_ “Ne ĝenu min!”

\_\_\_ “Kial vi ne komprenas tion?”

\_\_\_ “Ĉu vi bonvolas atendi, mi petas!”

\_\_\_ “Kiaj teruraj infanoj!”

\_\_\_ “Dankon, vi estas tre afabla!”

\_\_\_ “Nun mi tute ne havas tempon. Mi estas okupita.”

3. En kiuj el la sekvaj situacioj montriĝas konfliktoj kaj malpacoj?
- Du homoj dum interkonsiliĝo esprimas malsamajn opiniojn pri iu temo.
  - Du homoj dum interkonsiliĝo koleriĝas kaj disputas inter si.
  - Du homoj ne plu partoprenas semajnan preĝkunvenon ĉar ili ne povas paroli unu kun la alia.
  - Membroj de teamo kunlaboranta je iu projekto konstante plendas – ĉiuj diras ke la aliaj ne plenumas sian devon.
4. Kiuj el la sekvaj situacioj montras signojn de fremdiĝo?
- Du amikoj preterpasas surstrate sed sin reciproke ignoras.
  - Iu alvenas en preĝkunveno kaj ĉiuj varmkore lin/ŝin bonvenigas.
  - Kvankam ili ja estas afablaj unu al la alia, du anoj de grupo hezitas kune partopreni iun projekton.
5. Decidu ĉu la sekvaj eldiroj estas ĝustaj:
- Oni diru ekzakte kion oni pensas pri aliaj; ne gravas se ili ofendiĝas.
  - Estas en ordo mensogi por eviti konflikton.
  - Konfliktojn oni povas solvi per amo kaj afableco.
  - Vortoj estas pli efikaj kiam oni ame ilin diras.
  - Estas en ordo kvereli kun iu, se tiu komencis la kverelon.
  - Oni rajtas akre paroli al aliaj kiam oni estas malsana aŭ malfeliĉa.
  - Estas malafable moki aliajn kiam ili malĝuste ion faras.
  - Kiam estas missentoj inter amikoj, ĉiu speciale klopodu reproksimiĝi al la alia.
  - Kiam estas missentoj inter amikoj, ĉiu atendu ĝis kiam la alia klopodos reproksimiĝi.

## SEKCIO 7

Legu la subajn citaĵojn kaj parkerigu ilin.

**“... klaĉado estingas la fajron de l’ koro kaj sufokas la vivon de l’ animo.”<sup>16</sup>**

**“Eĉ ne flustru pri la pekoj de aliaj dum ankoraŭ vi mem estas pekanto.”<sup>17</sup>**

**“Ne malice parolu ke ne devos vi aŭdi tian parolon pri vi mem; kaj ne grandigu la kulpojn de aliaj ke viaj propraj kulpoj ne aspektu grandaj ...”<sup>18</sup>**

**“Ho Filo de l’ Esto! Kiel povis vi forgesi viajn proprajn kulpojn kaj okupiĝi pri la kulpoj de aliaj? Kiu ajn tion faras estas malbenita de Mi.”<sup>19</sup>**

1. Kiel efikas klaĉado je la klaĉanto? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
2. Kion ni ekkonsciu antaŭ ol pensi pri la pekoj de aliaj? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
3. Kio okazos al ni, se ni pligrandigas la kulpojn de aliaj? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
4. Kion ni memoru kiam ni pensas pri la kulpoj de aliaj? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

## SEKCIO 8

Kun la supraj citaĵoj enmense faru la sekvajn ekzercojn:

1. Kio okazas al la progreso de la animo de persono, kiu koncentriĝas je la kulpoj kaj misoj de aliaj? \_\_\_\_\_
2. Kiel klaĉado efikas je iu komunumo? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
3. Kion vi faras kiam amiko ekparolas pri la kulpoj kaj misoj de alia persono? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
4. Decidu ĉu la jenaj eldiroj estas ĝustaj:
  - \_\_\_ Ni ne klaĉas kiam ni parolas pri veraj kulpoj kaj misoj de iu alia.
  - \_\_\_ Kiam samtempe ni parolas pri la bonaj kvalitoj de iu persono kaj pri ties kulpoj, ni ne klaĉas.
  - \_\_\_ Klaĉado fariĝis ĝenerala kutimo en nia socio kaj ni klopodu ĝin eviti kaj nin disciplinu.
  - \_\_\_ Ne nocas klaĉi se la aŭskultanto promesas ne rediri kion ni diras pri alia persono.
  - \_\_\_ Klaĉado estas unu el la plej fortaj malamikoj de unueco.
  - \_\_\_ Se ni ekkutimas konstante paroladi pri aliaj homoj, ni facile riskas ekklaĉi.
  - \_\_\_ Kiam dum kunveno de Loka Spiritita Asembleo oni pridiskutas la kapablojn de diversaj homoj por nomumi la membrojn de komitato, tio estas klaĉado.
  - \_\_\_ Kiam ni emas klaĉi, ni memoru niajn proprajn kulpojn kaj misojn.

- Kiam ni ekscias ke persono faras ion kio damaĝas la Kredon, ni diskutu pri tio kun la membroj de la komunumo.
- Kiam ni ekscias ke persono faras ion kio damaĝas la Kredon, ni informu la Lokan Spiritan Asembleon.
- Ne estas malĝuste se geedzoj parolas pri la kulpoj kaj misoj de aliaj homoj, ĉar ili nenion kaŝu unu de la alia.

## SEKCIO 9

La celo de tiu ĉi ĉapitro, kiel menciita komence, estas asisti la partoprenantojn je siaj klopodoj evoluigi kaj fortikigi la kutimon ĉiutage legi citaĵojn el la Sanktaj Skriboj kaj pripensi ilian signifon. Legi la versojn de Dio ĉiumatene kaj ĉiuvespere estas instruo de Bahá'u'lláh el kiu rezultas spirita evoluo. La sekva citaĵo memorigas al ni la benojn, kiujn ni ricevis per la plenumado de devoj, kaj vi estas kuraĝigita ĝin parkerigi:

**“Mergiĝu vi en la oceano de Miaj vortoj, por ke rivelu vi ĝiajn sekretojn kaj malkovru vi ĉiujn perlojn de l' saĝo kaŝiĝantaj en ĝiaj profundoj.”<sup>20</sup>**

Esti fininta tiun ĉi ĉapitron vi eble deziras akiri libron el la Skriboj de Bahá'u'lláh kaj ĉiutage legi en ĝi. La *Kaŝitaj Vortoj* estas bona unua elekto.

## Fontoj

1. Bahá'u'lláh, citita de Shoghi Effendi en *The Advent of Divine Justice*, Bahá'í Publishing Trust, Wilmette 2006, eldono de 2018; 39, p. 36–37
2. *Gleanings from the Writings of Bahá'u'lláh*, Bahá'í Publishing Trust, Wilmette 1983, eldono de 2017; 139:8, p. 345
3. Bahá'u'lláh, *La Kaŝitaj Vortoj de Bahá'u'lláh*, Bahaa Esperanto-Ligo, 2009–166 BE; Barcelono, Hispana Bahaa Eldonejo (Editorial Bahá'í de España), araba 31
4. *Kaŝitaj Vortoj*; persa 5
5. *Kaŝitaj Vortoj*; persa 69
6. 'Abdu'l-Bahá, citita en Shoghi Effendi *The Advent of Divine Justice*; 40, p. 39
7. Samloke
8. *Gleanings*; 136:6, p. 336
9. *Tablets of Bahá'u'lláh revealed after the Kitab-i-Aqdas*, Bahá'í Publishing Trust, Wilmette 1988, eldono de 2005; 9:5, p. 138
10. *Gleanings*; 137:3, p. 338
11. *Gleanings*; 132:5, p. 327; ankaŭ en: *Perloj de l' Saĝo. El la Skriboj de Bahá'u'lláh*, Bahaa Esperanto-Ligo, Frankfurto ĉe Majno, 1994, n-ro 39, p. 23 (traduko reviziita)
12. *Will and Testament of 'Abdu'l-Bahá*, Bahá'í Publishing Trust, Wilmette 1944, eldono de 2013; 1:23, p. 26
13. *Gleanings*; 5:5, p. 8
14. El parolado farita la 16an kaj 17an de Oktobro 1911, publikigita en *Parizaj Paroladoj de Abdul Baha*, Weinheim 1932, represo Berno 1978; p. 9 (traduko reviziita)
15. El parolado de 'Abdu'l-Bahá je la 21a de Oktobro 1911, samloke, p. 17 (traduko reviziita)
16. *Gleanings*; 125:3, p. 300
17. *Kaŝitaj Vortoj*; araba 27
18. *Kaŝitaj Vortoj*; persa 44
19. *Kaŝitaj Vortoj*; araba 26
20. *Gleanings*, 70:2, p. 154



# Preĝado

Celo

Pripensi la signifon de preĝado kaj  
fortikigi la kutimon regule preĝi





## SEKCIO 1

La kursoj de la Ruhi-Instituto intencas helpi al la partoprenantoj iri padon de servado. Ni iras tiun ĉi padon instigitaj per duobla celo: spirite kaj intelekte kreski kaj kontribui al la transformado de la socio. Tiuj ĉi du aspektoj de nia destino estas nesepareblaj unu de la alia. Bahá'u'lláh admonas nin en unu tekstero:

**“Ne okupiĝu vi pri viaj propraj interesoj; estu viaj pensoj fiksitaj je tio, kio restarigos la bonfarcon de la homaro kaj sanktigos la korojn kaj animojn de l' homoj.”<sup>1</sup>**

En alia tekstero Li klarigas:

**“... la celo por kiu mortemaj homoj elpaŝis, el plena nenieco, en la regnon de l' estado, estas ke ili laboru por la plibonigo de la mondo kaj vivu kune en konkordo kaj harmonio.”<sup>2</sup>**

Rilate nian internan kondiĉon Li deklaras:

**“Pura koro estas spegulo; purigu ĝin per la polurilo de l' amo kaj rezigno pri ĉio krom Dio, por ke en ĝi ekbrilu la vera suno kaj aŭroro la eterna mateno.”<sup>3</sup>**

Kaj 'Abdu'l-Bahá diras al ni:

**“Viaj koroj devas esti puraj kaj viaj intencoj sinceraj por ke vi fariĝu ricevantoj de sanktaj donacoj.”<sup>4</sup>**

1. Je kio koncentriĝu niaj pensoj kaj interesoj? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
2. Por kiu celo elpaŝis ni el plena nenieco en la regnon de l' estado? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
3. Per kio ni purigu la spegulon de nia koro? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
4. Kiuj estas iuj el la kondiĉoj, kiuj altiras sanktajn donacojn? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

5. Ĉu io el la sekva ĝustas?

- Unue vi zorgu por vi mem kaj poste vi povos zorgi pri aliaj.
- Se vi ĉiam helpas aliajn fine ne plu videblos por vi viaj propraj celoj.
- Vi mem estas via plej proksima amiko.
- Plej gravas eltrovi tion kio igas vin feliĉa.
- Sekvu viajn revojn kaj ili vin kondukos al kontento.
- Tiel longe kiel neniu alian vi ofendas ne gravas kion vi faras.
- Tiel longe kiel vi faras ion bonan estas en ordo se viaj motivoj estas egoaj.

## SEKCIO 2

Kerna konvinko rilate nian duoblan destinon estas ke noblaj ni estas kreitaj. Bahá'u'lláh diras:

**“Ho Filo de l’ Spirito! Mi kreis vin riĉa, kial vi faras vin mem senhava? Nobla Mi faris vin, pro kio vi humiligas vin mem? El la esenco de sciado Mi estadon al vi donis, kial vi serĉas luminiĝon ĉe iu krom Mi? El la argilo de amo Mi vin modlis, kial vi okupiĝas pri io alia? Turnu vian rigardon al vi mem, ke vi trovu Min interne de vi, forta, potenca kaj memekzistanta.”<sup>5</sup>**

Plenigi la liberajn spacojn sube helpos al vi pripensi tiun ĉi citaĵon.

“Hi Filo de l’ Spirito! Mi kreis vin \_\_\_\_\_, kial vi faras vin mem \_\_\_\_\_?  
\_\_\_\_\_ Mi \_\_\_\_\_ vin, pro kio vi \_\_\_\_\_ vin mem? El  
la \_\_\_\_\_ de \_\_\_\_\_ Mi estadon al vi donis, kial vi \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_ ĉe iu \_\_\_\_\_? El la argilo de \_\_\_\_\_ Mi vin  
\_\_\_\_\_, kial vi \_\_\_\_\_ pri io alia? Turnu vian \_\_\_\_\_  
al \_\_\_\_\_, ke vi trovu \_\_\_\_\_ interne de vi, \_\_\_\_\_,  
kaj \_\_\_\_\_.”

Por esti fidela al la nobleco de nia animo devas ni turniĝi al la Fonto de nia estado kaj serĉi luminiĝon de Li. Unu el la plej konvinkaj vojoj por atingi tion estas pere de preĝado. Shoghi Effendi, Gardanto de la Kredo, diras al ni, ke ĝia ĉefa celo estas “la evoluigo de la individuo kaj de la socio per la akirado de spiritaĵoj kaj povoj. Estas la animo de l’ homo kiu unue devas esti nutrata. Kaj povas preĝado tiun spiritan nutrandon plej bone provizi.”<sup>6</sup>

### SEKCIO 3

Dio estas la Ĉion-Scianta, la Ĉio-Saĝa. Li kreis nin kaj scias kio estas en nia koro kaj kio plej bonas por ni. Li ne bezonas niajn preĝojn. Kial do ni preĝu?

‘Abdu’l-Bahá konstatas:

**“En la plej nobla preĝo la homoj preĝas nur pro amo al Dio kaj ne ĉar ili timas Lin aŭ la inferon aŭ esperas favorojn aŭ la paradizon. ... Kiam iu enamiĝas al alia homo, estas por li neeble ne mencii la nomon de la amato. Kiom pli malfacilas ne mencii la Nomon de Dio kiam oni ekamis Lin. ... La spiritan homon ravas nenio krom memori Dion.”<sup>7</sup>**

Kaj, responde al demando, Li eksplikas:

**“Se iu amiko amas alian, ĉu ne estas nature ke li tion mencias? Kaj, kvankam li bone scias ke lia amiko konscias pri lia amo, ĉu li tamen ne deziras ĝin esprimi al li? ... Ĝustas ke Dio konas la dezirojn de ĉiuj koroj; sed la impulso preĝi estas natura, fontanta el la amo de la homo al Dio.”<sup>8</sup>**

1. Kompletigu la sekvajn frazojn:

- a. En la \_\_\_\_\_ preĝo, ni \_\_\_\_\_ nur pro \_\_\_\_\_ al Dio, kaj ne ĉar ni timas Lin aŭ la \_\_\_\_\_, aŭ esperas \_\_\_\_\_ aŭ la \_\_\_\_\_.
- b. Kiam ni \_\_\_\_\_ al alia homo, estas \_\_\_\_\_ al ni ne mencii la \_\_\_\_\_ de nia \_\_\_\_\_. Kiom pli \_\_\_\_\_ estas ne \_\_\_\_\_ la Nomon de \_\_\_\_\_, kiam oni \_\_\_\_\_ Lin.
- c. Spiritan homon \_\_\_\_\_ nenio krom \_\_\_\_\_ Dion.

2. Kial ni preĝas? \_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_

3. Kion signifas “memori Dion”? \_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_

4. Kio estas la plej fervora deziro de persono enamiĝinta al alia? \_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_

5. El kio originas la impulso preĝi? \_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_

## SEKCIO 4

En preĝo revelaciita de Bahá'u'lláh ni legas:

**“Mi petegas al Vi ..., faru mian preĝon fajro forbruligonta la vualojn, kiuj ekskludas min de Via beleco, kaj lumo, kiu gvidos min al la oceano de Via Ĉeesto.”<sup>9</sup>**

Ni en tiu sama preĝo petas de Dio:

**“Faru mian preĝon, ho mia Eternulo, fonto de vivantaj akvoj, per kiu mi vivu tiel longe, kiel daŭros Via suvereneco, kaj menciu Vin en ĉiu el Viaj mondoj.”<sup>10</sup>**

1. Kiusence preĝado povas esti kiel fajro? Kion ĝi forbruligas? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
2. Menciu kelkajn vualojn, kiuj ekskludas nin de Dio. \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
3. Ĉu preĝado povas esti kiel lumo? Kien ĝi kondukas nin? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
4. Ĉu preĝado povas esti kiel fonto de vivantaj akvoj? Kion ĝi donas al nia animo?  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

## SEKCIO 5

Legu kaj pripensu la jenajn vortojn de ‘Abdu’l-Bahá:

**“Nenio estas pli dolĉa en la mondo de l’ ekzistado ol preĝado. La homo devas vivi en stato de preĝado. La stato plej benita estas tiu de preĝado kaj de petegado. Preĝado estas konversacio kun Dio. La plej grava atingo aŭ la plej dolĉa stato estas nenio alia ol konversacio kun Dio. Ĝi kreas spiritecon, vekas mensan atenton kaj ĉielajn sentojn, naskas novajn altirojn de la Regno kaj stimulas la kapablojn percepti la pli altan ekkonon.”<sup>11</sup>**

1. Kio estas la plej dolĉa stato en la mondo de la ekzistado? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

2. Kion signifas “stato de preĝado”? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
3. Menciu kelkajn atributojn kreitajn per preĝado. \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
4. Rerigardu la citaĵojn, kiujn vi studis en tiuj ĉi kelkaj sekcioj kaj skribu kvin frazojn pri kio estas preĝado.
  - Preĝado estas \_\_\_\_\_
  - Preĝado estas \_\_\_\_\_
  - Preĝado estas \_\_\_\_\_
  - Preĝado estas \_\_\_\_\_
  - Preĝado estas \_\_\_\_\_

## SEKCIO 6

Legu la sekvajn vortojn de Bahá’u’lláh kaj meditu pri ili:

**“Ekkantu, ho Mia servanto, la versojn de Dio, kiujn ricevis vi, samkiel ili estas kantataj de tiuj proksimiĝintaj al Li, por ke la dolĉeco de Via melodio instigu vian propran animon kaj altiru la korojn de ĉiuj homoj. Kiu tiel recitas, en la privateco de sia ĉambro, la versojn revelaciitajn de Dio, kaŭzos la disigantajn anĝelojn de la Ĉiopova disigi foren la bonodoron de la vortoj elbuŝigitaj kaj faros la koron de ĉiu honestulo altenpulsu. Kvankam li eble, unue, restas nekonscia pri ĝia efekto, devas tamen la beno de la graco donacita al li nepre pli aŭ malpli frue ekinflui lian animon. Tiaj estas la misteroj de la Revelacio de Dio dekretitaj per la Volo de Tiu, Kiu estas la Fonto de potenco kaj saĝo.”<sup>12</sup>**

1. Kion signifas la vorto “ekkanti”? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
2. Kiel ni kantu la versojn de Dio? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
3. Kion signifas la vorto “reciti”? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

4. Kion signifas “disigi foren”? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
5. Kiun efikon la dolĉeco de nia melodio havos je nia animo? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
6. Kiun efikon la dolĉeco de nia melodio havos je la koroj de aliaj? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

## SEKCIO 7

Vi eble deziras parkerigi la jenajn du erojn el preĝo revelaciita de Bahá'u'lláh:

**“Ho Dio, mia Dio! Ne rigardu miajn esperojn kaj miajn farojn, sed rigardu nur Vian volon, kiu ampleksas la ĉielojn kaj la teron. Je la Plej Granda Nomo, ho Vi Sinjoro de ĉiuj nacioj! Mi deziras nur kion Vi deziras kaj amas nur kion Vi amas.”<sup>13</sup>**

**“Tro alta Vi estas por ke la laŭdo de tiuj, kiuj estas proksimaj al Vi, povus ascendi ĝis la ĉielo de Via proksimeco aŭ ke la birdoj de la koroj de tiuj, kiuj estas sindonaj al Vi, atingus la enirejon de Via pordego. Mi atestas, ke Vi estas sanktigita super ĉiuj atributoj kaj sankta super ĉiuj nomoj. Ne estas alia Dio krom Vi, la Plej Laŭdegata, la Plej Glora.”<sup>14</sup>**

## SEKCIO 8

‘Abdu’l-Bahá konstatas:

**“Estas la devo de lal servanto preĝi kaj serĉi asiston de Dio kaj petegi kaj humile elpeti Lian hepon. Tiel decas al la rango de servado kaj la Sinjoro laŭ Sia perfekta kaj ĉion-ampleksa saĝo dekretos kion ajn deziras Li.”<sup>15</sup>**

Kaj Li klarigas:

**“La spirito havas influon; la preĝado havas spiritan efikon. Sekve ni preĝas ‘Ho Dio! Resanigu tiun malsanulon!’ Eventuale Dio respondos. Ĉu gravas kiu preĝas? Dio respondos al la preĝo de ĉiu servanto, se tiu preĝo estas urĝa. Lia pardonemo estas vasta, senlima. Li respondas al la preĝoj de ĉiuj Liaj servantoj. Li respondas al la preĝo de tiu ĉi planto. Ĝia preĝo povas esti, ‘Ho Dio! Sendu al mi pluvon!’ Dio respondas la preĝon kaj la planto kreskas. Dio respondos al ĉiu ajn.”<sup>16</sup>**

Estas nature ke en niaj preĝoj ni petas Dion kontentigi niajn bezonojn. Tiel ni preĝas por nia sano kaj la sano de tiuj amataj de ni, ni preĝas por la spirita kaj materia progreso de niaj familioj, kaj ni preĝas por gvidado. Ne petas forton, kredon kaj konfirmon sur la pado de servado. Preĝante al Dio ni kompreneble memoru ke nia vivcelo estas akordigi nian volon kun Lia Volo. Tial ni devas preĝi ke plenumiĝu Lia Volo kaj estu ni pretaj submetiĝi je ĝi. Se vi parkerigas la sekvajn vortojn de ‘Abdu’l-Bahá, servos ili al vi kiel ĉiama fonto de ĝojo kaj konfirmo:

**“Ho vi, kiu turnas sian vizaĝon al Dio! Fermu viajn okulojn je ĉio alia kaj malfermu ilin por la regno de la Ĉio-Glora. Petu kion ajn vi deziras sole de Li; serĉu kion ajn vi serĉas sole de Li. Per unusola rigardo plenumas Li cent mil esperojn, per unusola vido Li kuracas cent mil nekuraceblajn malsanojn, per kapoklino Li sukuras ĉiun vundon, per alrigardo Li liberigas la korojn el la katenoj de aflikto. Li faras kiel Li faras kaj kiun rifuĝon havas ni? Li efektivas Sian Volon, Li ordonas kio al Li plaĉas. Tial pli bonas por vi humile klini vian kapon kaj konfidi al la Ĉio-Bena Sinjoro.”<sup>17</sup>**

## SEKCIO 9

El ĉio kion ĝis tie ĉi ni studis klariĝas ke preĝe turniĝi al Dio estas esenca postulo de spirita vivo. Kiel aparte dolĉa estas preĝi al Dio matene baldaŭ post vekiĝo kaj vespere antaŭ ol ekdormi. La tempo, kiun ni dediĉas al preĝado, kaj la nombro da preĝoj, kiujn ni diras, dependas de niaj bezonoj kaj de nia spirita soifo. Je ĉiu okazo ni povas elekti el la multaj preĝoj revelaciitaj de Bahá’u’lláh, Báb kaj ‘Abdu’l-Bahá. Tamen, Bahá’u’lláh revelaciis ankaŭ tri ĉiutagajn devigajn preĝojn. Shoghi Effendi diras:

**“Estas tri ĉiutagaj devigaj preĝoj. La plej mallonga konsistas el nur unu verso recitenda po unu fojon en ĉiu diurno je la tagmezo. La mezlonga [preĝo], kiu komenciĝas per la vortoj ‘Dio atestas, ke ne estas alia Dio krom Li’ estas recitenda po tri fojojn en ĉiu tago, matene, tagmeze kaj vespere. Tiu preĝo estas akompanata de certaj korpaj agoj kaj gestoj. La longa preĝo, kiu estas la plej precioza el la tri, estas recitenda po unu fojon en ĉiu diurno je la tempo kiam oni emas tion fari.**

**La kredanto estas tute libera en sia elekto de unu el inter tiuj tri preĝoj, sed estas devigita reciti unu el ili kaj tion fari konforme kun la specifaj instrukcioj respektive donitaj por ili.”<sup>18</sup>**

Kaj li daŭrigas:

**“Tiuj ĉi ĉiutagaj devigaj preĝoj, kune kun kelkaj aliaj specifaj preĝoj kiel la Preĝo por Resaniĝo kaj la Epistolo al Aĥmad, estas dotitaj de Bahá’u’lláh per apartaj potenco kaj signifo, kaj sekve ili estu akceptitaj kiel tiaj kaj recitataj de la kredantoj kun la senduba kredo kaj fido, ke dank’ al ili la kredantoj povas eniri en pli intiman komunion kun Dio kaj identigi sin mem pli komplete kun Liaj leĝoj kaj preskriboj.”<sup>19</sup>**

La tri devigaj preĝoj revelaciitaj de Bahá'u'lláh estas dirataj individue. Grupa preĝado je kiu ĉiutaga deviga preĝo estas recitata ene de grupo laŭ certa rito ne ekzistas en la Bahaa Kredo. La Preĝo por la Mortintoj estas la sola grupa preĝo preskribita de la bahaa leĝo. Ĝi estas recitenda antaŭ la enterigo de iu ĉeestanta dum la ceteraj de la grupo staras en silento.

1. Kion signifas la vorto “deviga”? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
2. Kiom da ĉiutagaj devigaj preĝoj revelaciis Bahá'u'lláh? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
3. Ĉu ni recitu ĉiujn tri preĝojn ĉiutage? \_\_\_\_\_
4. Se ni elektas diri la Longan Devigan Preĝon, kiom da fojoj ni recitu ĝin ĉiutage?  
\_\_\_\_\_
5. Kiom da fojoj, se ni elektas la Mezlongan Devigan Preĝon? \_\_\_\_\_
6. Kiom da fojoj, se ni elektas la Mallongan Devigan Preĝon? \_\_\_\_\_
7. Menciu iujn el la preĝoj kiuj havas apartan potencon: \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
8. Se ne jam tiel vi faris, parkerigu la Mallongan Devigan Preĝon:  
  
**“Mi atestas, ho mia Dio, ke Vi kreis min, por ke mi konu Vin kaj adoru Vin. Mi atestas ĉi-momente mian senfortecon kaj Vian potencon, mian povrecon kaj Vian riĉecon. Ne estas alia Dio krom Vi, la Helpo en Danĝero, la Mem-Ekzistanta.”<sup>20</sup>**
9. Kion ni atestas en tiu ĉi preĝo? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_



## SEKCIO 10

Ni memoru ke, krom la benojn ricevitajn per obeado al la leĝo de la deviga preĝo kaj la nutradon ricevitajn per diri aliajn preĝojn individue, niaj animoj estas ankaŭ altenlevataj kiam ni aŭdas la recitadon de preĝoj ene de kunvenoj, grandaj aŭ malgrandaj. Bahá'u'lláh diras al ni:

**“Kunvenu vi en pleja ĝojo kaj kamaradeco kaj recitu la versojn revelaciitajn de la Kompatema Sinjoro. Farante tiel malfermos vi por via ena estado la pordojn de vera scio kaj sentos vi kiel dotiĝas viaj animoj per firmeco kaj pleniĝas viaj koroj per radiantaj ĝojoj.”<sup>21</sup>**

Ni ĉiuj multe ĝojiĝas pro la konscio ke tra la mondo milobliĝas preĝkunvenoj, en kiuj amikoj kaj najbaroj kunvenas por komunii kun Dio. La Universala Domo de Justeco skribas:

**“Preĝkunvenoj estas okazoj en kiuj ĉiu ajn partoprenu, enspiru la ĉielajn aromojn, spertu la dolĉecon de preĝado, meditu pri la Krea Vorto, transportiĝu sur la flugiloj de l' spirito kaj komuniu kun tiu Amata. Sentoj de kamaradeco kaj komuneco estiĝas, aparte en la spirite altenlevataj konversacioj, kiuj tiam nature okazas kaj per kiuj eble malfermiĝas la »urbo de la homa koro«.”<sup>22</sup>**

Kiam ni emas preĝi ni kviete atendas momenton por purigi nian menson de la ĉi-mondaj aferoj. Dum preĝado ni koncentras niajn pensojn je Dio. Post kiam ni recitis preĝojn, ni restas silentaj por iom da tempo kaj ne abrupte transiras al aliaj aktivecoj. La samo validas kiam en kunveno ni aŭskultas preĝadon de aliaj. Je tiuj okazoj ni konservas preĝan sintenon kaj atente aŭskultas la vortojn kvazaŭ ni mem ilin recitus.

1. En kia spirito ni kunvenu recitante la versojn de Dio? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
2. Kio estos la efiko de nia kunvenado por reciti la versojn de Dio? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
3. Preĝkunvenoj estas okazoj je kiuj ĉiu ajn animo povas  
– \_\_\_\_\_ ,  
– \_\_\_\_\_ ,  
– \_\_\_\_\_ ,  
– \_\_\_\_\_ ,  
– \_\_\_\_\_ , kaj  
– \_\_\_\_\_ .

4. Kiaj sentoj estiĝas ĉe preĝkunvenoj? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
5. Kio estas la efiko de spirite altenlevantaj konversacioj, kiuj nature okazas ĉe preĝkunvenoj? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
6. Skribu kelkajn vortojn pri la respektama sinteno, kiun ni elmontru kiam ni preĝas, ĉu sole aŭ en kunveno.  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

## SEKCIO 11

La unua ĉapitro de tiu ĉi libro fokusiĝis je la kutimo ĉiutage legi erojn de la Skriboj kaj pripensi ilian signifon. Tie ĉi vi pripensis la signifon de preĝado kaj rezulte fortikigis la kutimon ĉiutage preĝi. La antaŭa sekcio atentigis vin pri la graveco de komuna preĝado. Ĉio studita de vi ĝis tie ĉi preparis vin fari, se vi deziras, unuan agon sur la pado de servado: gastigi preĝkunvenon.

Kiel unuan paŝon vi eble deziras parkerigi kelkajn preĝojn kaj trovi eblecon ilin preĝi kune kun kelkaj amikoj. Samtempe vi povus certigi ke vi partoprenas almenaŭ unu preĝkunvenon en via komunumo kaj apartenas al ĝiaj entuziasmaj subtenantoj. Kaj fine, do, vi eble decidus mem gastigi preĝkunvenon invitante viajn amikojn, familianojn kaj najbarojn regule kunveni por preĝado kaj amika kunestado. Ne maloftas ke du aŭ tri partoprenantoj de tiu ĉi kurso kune komencas tian preĝkunvenon.

Kiel vi povas imagi, ne estas formalaj preskriboj por kiel preĝkunveno devas esti organizita. Sed klare ĝi estas renkontiĝo de amikoj en kiu estas preĝata, eroj el la Skriboj estas legataj kaj okazas altenlevaj konversacioj – ĉio tio en evidente spirita etoso. Ĉu vi povas diri kelkajn vortojn pri ĉiuj el la sekvaj temoj lige al la gastigo de preĝkunveno?

Varmkore kaj ame inviti: \_\_\_\_\_

---

---

---

Krei bonvenigan etoson: \_\_\_\_\_

---

---

---

Konservi devotan etoson: \_\_\_\_\_

---

---

---

Okazigi ĝojplenajn amikajn kunestadojn: \_\_\_\_\_

---

---

---

Stimuli spirite altenlevajn konversaciojn: \_\_\_\_\_

---

---

---

## Fontoj

1. *Gleanings from the Writings of Bahá'u'lláh*, Wilmette, Bahá'í Publishing Trust, 1983, eldono de 2017; 43:4, p. 105
2. Bahá'u'lláh, en *Trustworthiness: A compilation of Extracts from the Bahá'í Writings*, kompilita de la Esplordepartemento de la Universala Domo de Justeco, Bahá'í Publishing Trust, Londono 1987, n-ro 21, p. 5
3. *The Call of the Divine Beloved: Selected Mystical Works of Bahá'u'lláh*, Bahá'í World Centre, Haifa 2018, n-ro 2:43, p. 31
4. El parolado farita la 5an de Majo 1912, publikita en *The Promulgation of Universal Peace: Talks Delivered by 'Abdu'l-Bahá during His Visit to the United States and Canada en 1912*, Bahá'í Publishing, Wilmette 2012; p. 127
5. Bahá'u'lláh, *La Kaŝitaj Vortoj de Bahá'u'lláh*, Bahaa Esperanto-Ligo, 2009–166 BE; Barcelono, Hispana Bahaa Eldonejo (Editorial Bahá'í de España), araba 13
6. El letero datita la 8an de Decembro 1935 kaj skribita nome de Shoghi Effendi, publikigita en *Prayer and Devotional Life: A Compilation of Extracts from the Writings of Bahá'u'lláh, the Báb, and 'Abdu'l-Bahá and Letters of Shoghi Effendi and the Universal House of Justice*, Bahá'í Publishing, Wilmette 2019; n-ro 71 p. 31
7. Vortoj de 'Abdu'l-Bahá, cititaj en J. E. Esslemont, *Bahá'u'lláh kaj la nova epoko*. Dua eldono. Usono 1978; p. 101 (traduko reviziita)
8. Samloke (traduko reviziita)
9. Bahá'u'lláh, en *Bahaaj Preĝoj*; sen dato kaj loko, p. 61
10. Samloke, p. 62
11. Vortoj de 'Abdu'l-Bahá, cititaj en *Star of the West*, vol. 8, no 4 (17 May 1917). Represita. Oxford 1978; p. 41
12. *Gleanings*, 36:4, p. 105
13. Bahá'u'lláh en *Bahaaj Preĝoj*; p. 62
14. Samloke, p. 65-66
15. 'Abdu'l-Bahá en *Prayer and Devotional Life*, n-ro 24. p.7
16. El parolado de 'Abdu'l-Bahá farita la 5an de Aŭgusto 1912, publikigita en *The Promulgation of Universal Peace*, p. 345
17. *Selections from the Writings of 'Abdu'l-Bahá*, Bahá'í Publishing, Wilmette 2010, eldono de 2015; n-ro 22:1, p. 75–76
18. El letero datita la 10an de Januaro 1936 skribita nome de Shoghi Effendi, publikigita en *Prayer and Devotional Life*, n-ro 61, p. 25
19. El letero datita la 10an de Januaro 1936 skribita nome de Shoghi Effendi, citita en *Bahá'í Prayers. A Selection of Prayers Revealed by Bahá'u'lláh, the Báb, and 'Abdu'l-Bahá*, Bahá'í Publishing, Wilmette 2002, eldono de 2017; p. 301
20. Bahá'u'lláh en *Bahaaj Preĝoj*; p. 57
21. Bahá'u'lláh en *Prayer and Devotional Life*, n-ro 68, p. 29
22. El mesaĝo datita la 29an de Decembro 2015, publikigita en *Framework for Action: Selected Messages of the Universal House of Justice and Supplementary Material, 2006–2016*, Palabra Publications, West Palm Beach 2017, n-ro 35:49, p. 232



## Vivo kaj Morto

Celo

Aprezi ke la vivo ne konsistas el nur la  
variadoj kaj hazardoj de tiu ĉi mondo,  
sed ke ĝia vera signifo troviĝas  
en la disvolviĝo de la animo



## SEKCIO 1

La homa animo transcendas la materion kaj la fizikan mondon. ‘Abdu’l-Bahá en unu el Sia paroladoj eksplikas:

**“Tiuj ĉi materiaj korpoj estas kunmetitaj el atomoj; kiam tiuj ĉi atomoj komencas disiĝi ekas malkomponiĝado kaj sekvas kion ni nomas morto. ... Aliel estas rilate la animon. La animo ne estas kombiniĝo de elementoj; ĝi ne estas komponita el multaj atomoj; ĝi estas el unu nedividebla substanco kaj pro tio eterna. Ĝi estas plene ekster la fizika kreitaĵaro; ĝi estas senmorta!”<sup>1</sup>**

1. Kion signifas “kunmetita el”? \_\_\_\_\_
2. Ĉu la homa animo estas, kiel materiaj korpoj, kunmetita el diversaj elementoj? \_\_\_\_\_
3. Ĉu la homa animo estas fizika ento? \_\_\_\_\_

## SEKCIO 2

Letero skribita nome de Shoghi Effendi konstatas ke “la homa animo estiĝas je ĝia koncipiĝo”<sup>2</sup>. Responde al demando pri la signifo de “koncipiĝo” la Universala Domo de Justeco notas:

**“Nenio estas trovita en la Bahaaj Skriboj kio precize difinas la biologian momenton kaj naturon de la evento nomita ‘koncipiĝo’. La uzo de la termino en medicina kunteksto ŝajnas ankaŭ esti nepreciza. Efektive, unu kompreno de koncipiĝo estas, ke ĝi koincidas kun la fekundiĝo; alia tamen estas, ke ĝi okazas sekve de la fekundiĝo kaj ennestiĝo, la ekkomenco de gravedeco. Tiel povas esti, ke ne eblas scii kiutempe la asociiĝo de la animo kun la materia formo okazas, kaj tiaj demandoj eble nesolveblas per homa pensado aŭ esplorado ĉar ili rilatas al misteroj de la spirita mondo kaj la naturo de la animo mem.”<sup>3</sup>**

1. Kiam ekestiĝas la homa animo? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
2. Ĉu la termino “koncipiĝo” priskribas precizan biologian momenton? \_\_\_\_\_

## SEKCIO 3

La konekto inter la animo kaj la korpo estas nemateria; la animo nek eniras nek forlasas la korpon kaj ankaŭ ĝi ne okupas fizikan spacon. Ĝia asociiĝo kun la korpo similas tiun de lumo kaj spegulo, kiu ĝin reflektas. La lumo aperanta en la spegulo ne estas en ĝi. Simile la animo ne estas en la korpo. Kiel indikas ‘Abdu’l-Bahá,

**“... la racia animo, aŭ la homa spirito, ne vivas helpe de ĉi tiu korpo pere de enestado – tio volas diri, ke ĝi ne eniras ĝin; ĉar enestado kaj eniro estas karakterizaĵoj de korpoj, kaj la racia animo estas sanktigita super tio ĉi. Ĝi neniam eniris ĉi tiun korpon por ekestiĝi, tiel ke, forlasanta ĝin, ĝi bezonus iun alian estadojn. Ne, la konekto de la spirito kun la korpo estas ĝuste kiel la konekto de ĉi tiu lampo kun spegulo. Se la spegulo estas polurita kaj perfekta aperas en ĝi la lumo de la lampo, kaj se la spegulo rompiĝas aŭ estas kovrata per polvo la lumo restas kaŝita.”<sup>4</sup>**

1. Plenigu la spacojn en la sekvaj frazoj.
  - a. La racia animo, aŭ \_\_\_\_\_, ne vivas helpe de ĉi tiu korpo pere de enestado – tio volas diri, ke ĝi ne \_\_\_\_\_.
  - b. La \_\_\_\_\_ aŭ la homa spirito ne eniras la korpon; ĉar enestado kaj eniro estas \_\_\_\_\_, kaj la racia animo estas \_\_\_\_\_.
  - c. La animo neniam \_\_\_\_\_ por ekestiĝi, tiel ke, forlasanta ĝin, \_\_\_\_\_.
  - d. La konekto de la spirito kun la korpo estas ĝuste kiel la konekto de \_\_\_\_\_.
  - e. Se la spegulo estas polurita kaj perfekta aperas en ĝi \_\_\_\_\_.
  - f. Se la spegulo rompiĝas aŭ estas kovrata per polvo \_\_\_\_\_.
  
2. Decidu surbaze de kion vi studis ĝis nun ĉu la sekva ĝustas:
  - \_\_\_ La animo ne apartenas al la fizika mondo.
  - \_\_\_ La animo troviĝas interne de la korpo.
  - \_\_\_ La korpo estas la posedanto de la animo.
  - \_\_\_ La animo estas senmorta.
  - \_\_\_ La individuo komencas ekzisti kiam la animo asociiĝas kun la embrio.
  - \_\_\_ La vivo komenciĝas, kiam la individuo naskiĝas en tiun ĉi mondon.
  - \_\_\_ La materia ekzistado de la individuo plu daŭros post la morto.
  - \_\_\_ La vivo konsistas el tiuj aferoj, kiuj okazas al ni ĉiutage.



3. Uzu la metaforon de lumo kaj spegulo por priskribi la rilaton inter la animo kaj la korpo: \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

#### SEKCIO 4

Estas tre aparta rilato inter la animo kaj la korpo, kiuj kune estigas homan estaĵon. Tiu ĉi rilato daŭras nur dum la tempo de la mortema vivo. Kiam finiĝas la asociiĝo inter ili, ĉiu el ili revenas al sia origino – la korpo al la mondo de la polvo kaj la animo al la spiritaj mondoj de Dio, kie ĝi progresas plu. ‘Abdu’l-Bahá diras:

**“La homa spirito havas komencon sed ne finon: Ĝi pluekzistas por ĉiam.”<sup>5</sup>**

En unu el Sia paroladoj Li klarigas:

**“La spirito ne bezonas korpon, sed la korpo bezonas spiriton; aliel ĝi ne povas vivi. La animo povas vivi sen korpo, sed la korpo sen animo mortas.”<sup>6</sup>**

Kaj la Gardanto eksplikas:

**“Koncerne la homan animon: Laŭ la bahaaj Instruoj la homa animo ekestiĝas kun la formado de la homa embrio, kaj ĝi plu evoluas kaj post sia separiĝo de la korpo pasas tra senfinaj stadioj de ekzistado. Tiel ĝia progreso estas senfina.”<sup>7</sup>**

1. Kun la supraj citaĵoj enmense respondu la sekvajn demandojn:
- Ĉu la korpo bezonas animon? \_\_\_\_\_
  - Ĉu la animo bezonas korpon? \_\_\_\_\_
  - Kio okazas al la konekto inter la korpo kaj la animo kiam ni mortas? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
  - Kio okazas al la animo post la morto? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
  - Kiom longe daŭras la progreso de la animo? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
  - Kiam finiĝas la vivo? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

2. Decidu kio el la sekva agordas kun tio, kion ni studis en tiuj ĉi sekcioj:
- La morto estas puno.
  - La konekto inter la korpo kaj la animo daŭras nur dum la tempo de mortema vivo.
  - La korpo kapablas eterne progresi.
  - La animo ĉiame progresados.
  - La morto estas la fino de la vivo.
  - Estos tago de l' juĝo je kiu reviviĝos nia korpo.
  - Je la morto la animo havas pli da libereco ol ĝi havis antaŭe.
  - La vivo finiĝas per la morto.
  - Ni timu la morton.
  - Manĝaĵoj, vestoj, ripozado kaj refreŝiĝo estas bezonataj por la animo.
  - La animo laciĝas kiam la korpo foruzas sian energion.
  - La animon influas nek malsaneco nek malforteco de la korpo.
  - La homa estaĵo post la morto plu havos fizikajn bezonojn.

## SEKCIO 5

Ni vidis ke la animo ne okupas fizikan spacon kaj ne funkcias laŭ la leĝoj de la naturo kiel tion faras materiaj entoj. La animo influas la mondon pere de la korpo, sed tio ne estas la sola rimedo tra kiu la animo elmontras sian potencon. Bahá'u'lláh klaras:

**“Vere diras Mi: La homa animo estas ekzaltita super ĉia kresko kaj malkresko. Ĝi estas senmova sed tamen soras; ĝi progresas kaj tamen estas senmova.”<sup>8</sup>**

Kaj ‘Abdu’l-Bahá diras al ni:

**“Sciu ke la influo kaj percepto de la homa spirito estas de du specoj; tio estas, la homa spirito havas du manierojn kiel funkcii kaj kompreni. Unu maniero estas helpe de korpaj instrumentoj kaj organoj. Tiel ĝi vidas per la okulo, aŭdas per la orelo, parolas per la lango. ... La alia maniero de la spirito por influi kaj agi okazas sen ĉi tiuj korpaj instrumentoj kaj organoj.”<sup>9</sup>**

1. Plenigu la spacojn en la sekvaj frazoj:
- a. La homa animo estas ekzaltita super ĉia \_\_\_\_\_ kaj \_\_\_\_\_.
  - b. Ĝi estas \_\_\_\_\_ sed tamen \_\_\_\_\_.
  - c. Ĝi \_\_\_\_\_ kaj tamen estas \_\_\_\_\_.

2. Prisribu la du manierojn per kiuj la animo perceptas kaj influas en tiu ĉi mondo:

---

---

---

---

3. Ĉu vi povas doni ekzemplojn por la influo kaj agado de la animo sen korpaj rimedoj?

---

---

---

---

## SEKCIO 6

Nun, antaŭ la fono de la diskuto en la antaŭaj sekcioj, legu la sekvan citaĵon el la Skriboj de Bahá'u'lláh:

**“Sciu vi ke la homa animo estas ekzaltita super kaj estas sendependa de ĉiuj misoj de l’ korpo aŭ menso. Ke persono malsana elmontras signojn de malforto estas pro la malhelpoj kiuj sin metas inter ĝia animo kaj ĝia korpo, ĉar la animo mem restas netuŝita de ajnaj korpaj perturboj. Konsideru la lumon de la lampo. Kvankam eble ekstera objekto sin trudas en ĝian radiadon, la lumo mem brilas plu per nereduktita potenco. Samtiel ĉiu malsano afliktanta la korpon de l’ homo estas malhelpo kiu preventas la animon manifesti sian imanentan povon kaj potencon. Tamen, kiam ĝi forlasas la korpon elmontros ĝi tian superecon kaj rivelos ĝi tian influon kiajn nenia forto sur la Tero povas egali. Ĉiu pura, ĉiu rafinita kaj sanktigita animo estos dotita per treega potenco kaj jubilos en pleje intensa ĝojego.”<sup>10</sup>**

1. Klarigu per viaj propraj vortoj kiel la animo restas netuŝata de la misoj de la korpo aŭ la menso kaj kio evidentiĝos je ĝia separiĝo de la korpo.

---

---

---

---

---

---

---

---

2. Ĉu ni post la morto de nia fizika korpo konservos nian individuecon? \_\_\_\_\_

## SEKCIO 7

Bahá'u'lláh diras al ni:

**“Kaj nun pri via demando koncerne la homan animon kaj ĝian pluvivon post la morto. Sciu vere, ke la animo post sia elkorpiĝo daŭre progresos ĝis ĝi atingos la ĉeeston de Dio en stato kaj kondiĉo, kiujn nek la evoluo de epokoj kaj jarcentoj, nek la variadoj kaj hazardoj de ĉi tiu mondo povos ŝanĝi. Ĝi ekzistos tiel longe kiel ekzistos la Regno de Dio, Lia suvereneco, Lia povo kaj Lia potenco. Ĝi manifestos la signojn de Dio kaj Liajn atributojn kaj rivelos Liajn indulgon kaj favoron.”<sup>11</sup>**

1. Kiel longe post la fizika morto la animo progresos plu? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
2. En kia stato la animo daŭrigos sian vojon al la ĉeesto de Dio? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
3. Nomu kelkajn atributojn kaj signojn, kiujn la animo en tiu stato manifestos: \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
4. Surbaze de kion ni studis ĝis tie ĉi decidu kio el la sekva ĝustas:  
\_\_\_ La Regno de Dio daŭros ĉiame.  
\_\_\_ La animo havas la kapablon manifesti atributojn de Dio.  
\_\_\_ La preĝoj diritaj de ni por la forpasintoj ne influas la progreson de ilia animo.  
\_\_\_ La animo neniam ĉesas ekzisti.

## SEKCIO 8

Bahá'u'lláh deklaras:

**“Sciu, ke ĉiu aŭdanta orelo, se ĝi tenas sin pura kaj senmakula, devas, ĉiam kaj el ĉiu direkto, aŭskulti la voĉon, kiu eldiras tiujn sanktajn vortojn: ‘Vere, ni estas de Dio, kaj al Li revenos ni.’ La misteroj de la fizika morto de la homo kaj de lia reveno ne estas rivelitaj kaj restas plu kaŝitaj. ...  
La morto prezentas al ĉiu fidema kredanto la pokalon, kiu estas, vere, la vivo. Ĝi donas ĝojon kaj alportas feliĉon. Ĝi prezentas la donacon de eterna vivo.  
Koncerne tiujn, kiuj gustumis la frukton de la surtera ekzistado de l' homo, kio estas la rekono de la unusola vera Dio, laŭdegata estu Lia gloro – ilia vivo en la**

**mondo transmorta estas tia, ke Ni ne kapablas priskribi ĝin. La scio pri tio estas je Dio, la Sinjoro de ĉiuj mondoj.”<sup>12</sup>**

**Ho Filo de la Plejsupera! Faris Mi la morton por vi ĝojportanto. Pro kio malĝojas vi? Igis Mi la lumon superŝuti vin per sia splendoro. Kial vi vualiĝas antaŭ ĝi?<sup>13</sup>**

1. Kiu el la sekvaj eldiroj ĝustas?

La animo de homa estasĵo venas de Dio kaj revenos al Li.

Ĉia scio pri la vivo postmorta estas ĉe Dio.

Por fidanta kredanto la morto estas vivo.

La morto estas alportanto de ĝojego.

La misterojn de la morto ĉiuj konas.

Ni alte taksu la benojn de la vivo sed ne timu la morton ĉar ĝi estas ĝojportanto.

Ne gravas por ni ion scii pri la vivo postmorta.

2. Nun, havante en la menso kion ni studis en tiuj ĉi sekcioj, skribu mallongan alineon pri vivo, morto, korpo kaj animo.

---

---

---

---

---

---

---

---

---

---

---

---

---

---

---

---

---

---

---

---

---

---

---

---

## SEKCIO 9

‘Abdu’l-Bahá eksplikas:

**“Komence de sia vivo la homo troviĝis en la mondo de la utero, kie li evoluigis la kapablon kaj pretecon avanci al tiu ĉi mondo. La povojn necesajn por tiu ĉi mondo li akiris en tiu mondo. Li en tiu ĉi mondo bezonis okulojn – li ricevis ilin en la mondo de la utero. Li en tiu ĉi mondo bezonis orelojn – li ricevis ilin tie. Ĉiujn povojn bezonatajn en tiu ĉi mondo akiris li en la mondo de la utero. En tiu mondo prepariĝis li por tiu ĉi mondo, kaj kiam li eniris tiun ĉi mondon vidis li ke li posedas ĉiujn bezonatajn povojn kaj estas akirinta ĉiujn tiujn organojn bezonatajn por tiu ĉi mondo en la antaŭnaska. Do, sekvas el tio ke ankaŭ en tiu ĉi mondo li devas prepari sin por la mondo venonta. Tio kion li bezonas en la mondo de la Regno li devas akiri kaj al ĝi prepariĝi tie ĉi. Ĝuste kiel li akiris la povojn necesajn por tiu ĉi mondo en la mondo de la utero, tiel, same, li devas akiri tion kion li bezonas en la mondo de la Regno – tio estas, ĉiujn tiun ĉielajn povojn – en tiu ĉi mondo.”<sup>14</sup>**

1. Decidu ĉu la sekva ĝustas aŭ ne:

- Ĉiuj fortoj bezonataj por tiu ĉi mondo estas akirataj en la mondo de la utero.
- Ne necesas prepari sin por la vivo en la sekvanta mondo.
- Kio necesas en la mondo de la Regno devas esti akirita tie.
- La celo de tiu ĉi vivo estas akiri la povojn bezonatajn por la vivo sekvamonda.
- La vera vivo komenciĝas kiam oni mortas kaj transiras al la Dia Regno.
- La vera vivo komenciĝas en tiu ĉi mondo kaj plu daŭros post la fizika morto.

2. Nomu kelkajn el la kapabloj kiujn homa estaĵo ricevas en la mondo de la utero:

---

---

3. Nomu kelkajn el la dotaĵoj akirindaj tie ĉi por la vivo postmorta: \_\_\_\_\_

---

---

## SEKCIO 10

Bahá’u’lláh proklamas:

**“En tiu ĉi Tago la tuta devo de la homo estas akiri tiun porcion de la ondo de graco, kiun Dio elverŝas por li. Tial neniu konsideru la grandecon aŭ etecon de la ujo. La porcion de iuj eble povas teni homa manokavo, dum la porcio de aliaj eble plenigas tason kaj alies eĉ pokalon.”<sup>15</sup>**

1. Respondu la sekvajn demandojn surbaze de la supra citaĵo:
  - a. Kio estas la devo de ĉiu individuo en tiu ĉi Tago? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
  - b. Nomu kelkajn de la benoj, kiujn vi ricevis de Dio: \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
  - c. Al kio aludas la vorto “ujo” en la supra citaĵo? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
  - d. Kial ni ne konsideru “la grandecon aŭ etecon” de la kapableco per kiu ni estas dotitaj? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
  - e. Nomu kelkajn aferojn kiuj malhelpas nin akiri nian porcion de la graco de Dio:  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
  
2. Kio el la sekva ĝustas?
  - \_\_\_ La “grandeco aŭ eteco” de nia kapableco aludas al tio kiel inteligenta ni estas.
  - \_\_\_ Por servi Dion ni devas forgesi nian malfortecon kaj meti nian tutan fidon je Li.
  - \_\_\_ Se en tiu ĉi mondo ni ne evoluigas la kapablojn per kiuj Dio nin dotis, malfortos nia animo kiam ni atingos la transmondon.

## SEKCIO 11

Bahá'u'lláh diras:

**“Vi demandis Min pri kio estas la animo. Sciu, vere, ke la animo estas signo de Dio, ĉiela juvelo, kies realon ne kapablas kompreni la plej kleraj homoj kaj kies misteron neniu menso, eĉ la plej sagaca, povas esperi iam deĉifri. Ĝi estas la unua inter ĉiuj kreitaj aĵoj, kiu proklamas la perfektecon de sia Kreinto, la unua rekonanta Lian gloron, teniĝanta je Lia vero kaj adore kliniĝanta antaŭ Li.”<sup>16</sup>**

1. Plenigu la spacojn en la sekvaj frazoj:
  - a. La animo estas \_\_\_\_\_ de Dio.
  - b. La animo estas \_\_\_\_\_ kies \_\_\_\_\_ ne kapablas kompreni la plej kleraj homoj kaj kies \_\_\_\_\_ neniu menso, eĉ la plej sagaca, povas esperi iam \_\_\_\_\_.
  - c. La animo estas la \_\_\_\_\_, kiu proklamas la \_\_\_\_\_.
  - d. La animo estas la unua \_\_\_\_\_ la gloron de Dio.
  - e. La animo estas la unua \_\_\_\_\_ je la vero de Dio.
  - f. La animo estas la unua \_\_\_\_\_ antaŭ Dio.
  
2. Kio el la sekva ĝustas?
  - \_\_\_ “Deĉifri” signifas eltrovi.
  - \_\_\_ Inter ĉiuj kreitaj aferoj estas la homa menso la unua, kiu rekonas Dion.
  - \_\_\_ “Sagaca” signifas akra.
  - \_\_\_ Klera persono komprenas la misterojn de la animo.
  - \_\_\_ Nur grandaj filozofoj povas klarigi la perfektecon de Dio.
  - \_\_\_ Ne necesas pensi pri la animo, ĉar ni neniam kapablos ĝin kompreni.

## SEKCIO 12

Bahá'u'lláh deklaras:

**“Vi similas al tiu birdo, kiu soras per la plena potenco de siaj fortaj flugiloj kaj kun kompleta kaj ĝoja fido tra la vastoj de la ĉieloj, ĝis kiam, pelata kontentigi sian malsaton, ĝi avide impetas al la akvo kaj koto de la tero sube de ĝi, kaj, kaptiĝinta en la maŝoj de siaj deziroj, trovas sin malkapabla reflugi al la regnoj de kiuj venis ĝi. Ne povante forskui la ŝarĝon pezantan sur siaj makulitaj flugiloj, tiu birdo, ĝis tiam estinta ĉielulo, nun estas devigata serĉi loĝlokon en la polvo. Tial, ho Miaj servantoj, ne makulu viajn flugilojn per la koto de kapricoj kaj vanaj deziroj, kaj ne toleru, ke la polvo de envio kaj malamo ilin malpurigu, por ke vi ne estu malebligataj sori al la ĉieloj de Mia dia scio.”<sup>17</sup>**

1. Plenigu la spacojn en la sekvaj frazoj:
  - a. La birdo, al kiu aludas Bahá'u'lláh en tiu ĉi citaĵo estas la \_\_\_\_\_.



- b. Tiu ĉi birdo estas enloĝanto de la \_\_\_\_\_.
- c. Se ĝiaj flugiloj estas makulitaj la birdo devigatas serĉi loĝejon en la \_\_\_\_\_.

2. Nun respondu la sekvajn demandojn:

- a. Kiel la “flugiloj” de la animo “makuliĝas”? \_\_\_\_\_  
 \_\_\_\_\_  
 \_\_\_\_\_
- b. Nomu kelkajn el la “ŝarĝoj”, kiuj kiel la “akvo kaj koto de la tero” pezas sur la flugiloj de la animo: \_\_\_\_\_  
 \_\_\_\_\_  
 \_\_\_\_\_
- c. Nomu kelkajn el la aferoj kiuj malhelpas nin sori al la ĉieloj de dia scio: \_\_\_\_\_  
 \_\_\_\_\_  
 \_\_\_\_\_
- d. Kial iu animo ŝanĝus sian ĉielan hejmon kontraŭ la polvo de tiu ĉi mondo?  
 \_\_\_\_\_  
 \_\_\_\_\_

3. Decidu ĉu la sekvaj asertoj ĝustas?

- \_\_\_ Mondaj alkroĉiĝoj bremsas nian spiritan progreson.
- \_\_\_ Niaj kapricoj kaj vanaj deziroj retenas nin flugi al la ĉieloj de dia scio.
- \_\_\_ Envio kaj malamo estas naturaj trajtoj de homa estaĵo kaj ne ŝarĝas la animon.
- \_\_\_ Ni povas liberiĝi de la ŝarĝoj, kiuj preventas nin sori tra la vastecoj de la ĉieloj, per tio ke ni malligiĝas de la aferoj de tiu ĉi mondo.
- \_\_\_ La hejmo de la animo troviĝas en tiu ĉi mondo.

## SEKCIO 13

Bahá'u'lláh diras:

**“Kreinte la mondon kaj ĉion, kio vivas kaj moviĝas en ĝi, Li per Sia senrestrikta kaj suverena volo senpere elektis doti la homon per la unika distingo kaj kapablo koni Lin kaj ami Lin, kapablo, kiu nepre devas esti konsiderata kiel la**

**genera impulso kaj primara celo de la tuta kreitaĵaro. ... Sur la plej internan realon de ĉiu kreitaĵo Li verŝis la lumon de unu el Siaj nomoj kaj faris ĝin ricevanto de la gloro de unu el Siaj atributoj. Sed sur la realon de la homo Li ja koncentris la briladon de ĉiuj Siaj nomoj kaj atributoj kaj faris ĝin spegulo de Sia propra Memo. Inter ĉiuj kreitaĵoj nur la homo estas elektita por tiom granda favoro, tia daŭranta malavaro.”<sup>18</sup>**

1. Plenigu la subajn spacojn:

- a. Dio elektis doti la homon per la unika distingo kaj kapablo \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_.
- b. Sur la plej internan realon de \_\_\_\_\_ Dio verŝis la lumon de \_\_\_\_\_ kaj faris ĝin ricevanto de la gloro de \_\_\_\_\_.
- c. Sur la realon de la homo Li koncentris la briladon de \_\_\_\_\_ kaj faris lin spegulo \_\_\_\_\_.

2. Nun respondu la sekvajn demandojn:

- a. Ĉu vi povas nomi kelkajn atributojn de Dio? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
- b. Nomu kelkajn el la atributoj de Dio, kiujn la homa animo povas speguli: \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
- c. Kiel povas tiuj ĉi atributoj manifestiĝi? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
- d. Por kiu granda favoro estas la homo elektita? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

3. Kio el la sekva ĝustas?

- \_\_\_ La homo ne distingiĝas de la cetera kreitaĵaro.
- \_\_\_ La kapablo ekkoni kaj ami Dion estas la genera impulso kaj ĉefa celo de ĉio kreita.
- \_\_\_ La realo de ĉiu kreita afero estas la ricevanto de unu el la atributoj de Dio.
- \_\_\_ La homa animo povas reflekti ĉiujn atributojn de Dio.

## SEKCIO 14

Bahá'u'lláh diras al ni:

**“Tiuj energioj tamen, per kiuj la Tagstelo de Dia malavaro kaj Fonto de ĉiela gvidado dotis la realon de l’ homo, latentas ene de li same kiel kaŝiĝas la flamo ene de la kandelo kaj la lumradioj potenciale prezentiĝas en la lampo. Mondaj deziroj eble forvualas la radiadon de tiuj energioj same kiel la lumo de la suno povas kaŝiĝi sub la polvo kaj koto kovrantaj la spegulon. Nek la lampo nek la kandelo povas eklumi nur per siaj propraj nesubtenataj klopodoj, nek iam eblos al la spegulo purigi sin mem de siaj malpuraĵoj. Estas klare kaj evidente, ke antaŭ ol fajro estos eklumigita la lampo neniam eklumos kaj antaŭ ol estos la malpuraĵo forigita de la surfaco de la spegulo povos ĝi neniam speguli la bildon de la suno aŭ reflekti ĝian lumon aŭ gloron.”<sup>19</sup>**

1. Kion signifas la vorto “latenta”? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
2. Nomu kelkajn el la popoloj, kiuj latentas en la homa animo: \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
3. Kiun kapablon havas lampo? \_\_\_\_\_
4. Kiun kapablon havas spegulo? \_\_\_\_\_
5. Kion vi devas fari al lampo por ke ĝi povas doni lumon? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
6. Kion vi devas fari al spegulo por ke ĝi povas reflekti lumon? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
7. Ĉu la lampo kaj la spegulo povas manifesti siajn povojn per si mem? \_\_\_\_\_
8. Kiel ni povas rilatigi tiujn du ekzemplojn al la kondiĉo de la homa animo? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
9. Kiu povas ebligi al la homa animo manifesti siajn povojn? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

## SEKCIO 15

Bahá'u'lláh diras:

**“La pordo al la ekkono de la Eternulo ĉiam estis kaj por ĉiam restos fermita antaŭ la vizaĝo de la homo. Neniu homa kompreno iam akiros aliron al Lia sankta kortego. Tamen, kiel signon de Sia graco kaj kiel pruvon de Sia tenera bonkoreco, manifestis Li al la homoj la Tagstelojn de Sia dia gvidado, la Simbolojn de Sia dia unueco, kaj ordonis, ke koni tiujn sanktigitajn Estaĵojn estu identa kun koni Lian propran Memon. Kiu rekonas ilin, tiu rekonis Dion. Kiu sekvas ilian vokon, tiu sekvas la Voĉon de Dio, kaj kiu atestas la veron de ilia Revelacio, tiu atestas la veron de Dio Mem. Kiu forturniĝas de ili, estas forturniĝinta de Dio, kaj kiu malkredas ilin, estas ne kredinta Dion. Ĉiu el ili estas la Vojo de Dio, kiu konektas tiun ĉi mondon kun la regnoj supraj, kaj la Standardo de Lia Vero por ĉiu en la regnoj de la tero kaj la ĉielo. Ili estas la Manifestiĝoj de Dio inter la homoj, la pruvoj de Lia Vero kaj la signoj de Lia gloro.”<sup>20</sup>**

1. Surbaze de la supra citaĵo respondu la sekvajn demandojn:
  - a. Ĉu eblas al ni rekte ekkoni Dion? \_\_\_\_\_
  - b. Kiel, do, ni povas ekkoni Dion? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
  - c. Ĉu vi povas nomi kelkajn el la Tagsteloj de dia gvidado? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
  - d. Kies Voĉon estas aŭskultintaj tiuj, kiuj aŭskultis la Manifestiĝojn de Dio? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
  - e. De Kiu forturniĝas ni kiam ni ignoras al vokon de la Manifestiĝoj de Dio? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
  
2. Kompletigu la sekvajn frazojn:
  - a. La pordo al la ekkono de la Eternulo ĉiam estis kaj por ĉiam restos \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_.
  - b. Neniu homa kompreno iam akiros aliron al \_\_\_\_\_.
  - c. Kiel signon de \_\_\_\_\_ kaj kiel pruvon de \_\_\_\_\_,  
Dio sendis Sian Manifestiĝojn.
  - d. Ekkoni la Manifestiĝojn de Dio estas identa kun \_\_\_\_\_.

- e. Kiu rekonas Ilin, \_\_\_\_\_.
- f. Kiu sekvas Ilian vokon, \_\_\_\_\_.
- g. Ĉiu el Ili estas la Vojo de Dio, \_\_\_\_\_  
 \_\_\_\_\_  
 \_\_\_\_\_.

3. Kio el la sekva ĝustas?

- \_\_\_ Ni povas spirite kreski nur pere de niaj klopodoj.
- \_\_\_ Dio donis al ni menson kaj tiu sufiĉas por nia progreso.
- \_\_\_ Ni spirite progresos per la rekono de la Manifestiĝo de Dio kaj ne devos fari pliajn klopodojn.
- \_\_\_ Ni povas spirite progresi per la rekono de la Manifestiĝo de Dio kaj per tio ke ni klopodas vivi laŭ Liaj instruoj.
- \_\_\_ Ni povas ekkoni Dion rekte.
- \_\_\_ La homo povas fariĝi ĝuste kiel Dio.
- \_\_\_ Dio estas ekzaltita super la homa komprenkapablo.
- \_\_\_ Kiam ni aŭskultas la vortojn de Manifestiĝo de Dio aŭskultas ni la Voĉon de Dio.

## SEKCIO 16

Bahá'u'lláh deklaras:

**“La Profetoj kaj Mesaĝistoj de Dio estas subensenditaj kun la sola celo gvidi la homaron al la rekta Pado de l’ Vero. La celo, kiu fudamentas Ilian revelacion, estis eduki ĉiujn homojn por ke ili, je la horo de l’ morto, en pleja pureco kaj sankteco kaj kun absoluta malligiteco ascendu al la trono de la Plej Alta.”<sup>21</sup>**

Kaj en alia tekstero Li diras:

**“La homo estas la plej alta talismano. Sed la manko de adekvata edukado senigis lin je tio, kion imanente li posedas. Per unu vorto el la buŝo de Dio estis li vokita al estado; per plia vorto estis li gvidata al la rekono de la Fonto de sia edukiĝo; per ankoraŭ plia vorto estis liaj rango kaj destino garantiitaj. La Granda Estaĵo diras: Konsideru la homon kiel minejon riĉa je netakseble valoraj juveloj. Nur edukado atingas, ke rivelas ĝi siajn trezorojn kaj ebligas al la homaro profiti el tiuj. Se homo meditus pri tio, kion rivelis la Skriboj senditaj suben el la ĉielo de la sankta Volo de Dio, senhezite rekonas li ke ilia celo estas ke ĉiuj homoj estu konsiderataj kiel unu animo, tiel ke la sigelo kun la vortoj ‘La Regno apartenos al Dio’ stampiĝu sur ĉiu koro kaj la lumo de Dia mal-avaro, de graco kaj pardonemo tegu la tutan homaron.”<sup>22</sup>**

1. Kiucele la Profetoj kaj Mesaĝistoj de Dio estas subensenditaj? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
2. Kiu celo fundamentas Ilian revelacion? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
3. Kion signifas la vorto “talismano”? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
4. Kio estas la sekvo de mankanta edukado? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
5. Kion kapablas atingi taŭga edukado? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
6. Kio estas la Fonto de nia edukado? \_\_\_\_\_
7. Kio estas nia destino? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
8. Nomu kelkajn el la juveloj, kiujn rivelas edukado: \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
9. Kion fakte ni vere rekonas kiam ni meditas pri la Sanktaj Skriboj? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

## SEKCIO 17

Bahá'u'lláh diras:

**“Vi krome demandis Min pri la stato de la animo post sia separiĝo disde la korpo. Vere, sciu vi ke, se la animo de homo estas sekvinta la vojojn de Dio, certe revenos ĝi kaj estos bonvenigata je la gloro de la Amato. Je la justeco de Dio! Ĝi atingos**

staton kiun ne kapablas peniko bildigi nek lango priskribi. La animo restinta fidela al la Kozo de Dio kaj neŝancele firme teninta sin sur Lia Pado post sia ascendo ekposedos tian povon, ke ĉiuj mondoj kreitaj de la Ĉiopova tra ĝi povos profiti.”<sup>23</sup>

1. Kompletigu la sekvajn frazojn:
  - a. Se animo sekvis la vojojn de Dio, ĝi certe \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_.
  - b. Ĝi atingos staton kiun \_\_\_\_\_.
  - c. La \_\_\_\_\_ restinta \_\_\_\_\_ al la \_\_\_\_\_ de \_\_\_\_\_ kaj neŝancele firme \_\_\_\_\_ sin sur \_\_\_\_\_ post sia \_\_\_\_\_ ekposedos tian \_\_\_\_\_, ke ĉiuj mondoj kreitaj de la \_\_\_\_\_ tra ĝi povos \_\_\_\_\_.

## SEKCIO 18

Bahá'u'lláh diras al ni:

**“Benata estas la animo, kiu en la horo de sia separiĝo de la korpo estas sanktigita de la vanaj imagoj de la popoloj de tiu-ĉi mondo. Tia animo vivas kaj moviĝas laŭ la Volo de sia Kreinto kaj eniras la plejaltan Paradizon. La ĉielaj hurioj, kiuj loĝas en la plej noblaj rezidejoj, cirkulos ĉirkaŭ ĝi, kaj la Profetoj de Dio kaj Liaj elektitoj serĉos ĝian kunestadon. Kun ili tiu animo libere konversos kaj rakontos al ili kion ĝi suferis sur la vojo al Dio, la Sinjoro de ĉiuj mondoj.”<sup>24</sup>**

**“Li pardonu la pekanton kaj neniam malestimu ties mizeran kondiĉon, ĉar ne niu scias, kia estos lia propra fino. Kiom ofte pekanto atingis dum sia lasta horo la esencon de kredo, kaj, trinkante el la pokalo de la senmorteco, ekflugis al la ĉiela Kunularo! Kaj kiom ofte fervora kredanto je la horo de la ascendo de sia animo tiom ŝanĝiĝis ke falis en la plej fundan fajron.”<sup>25</sup>**

1. En kiu stato troviĝu nia animo kiam ĝi separiĝas de la korpo? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
2. Nomu kelkajn vanajn imagojn: \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

3. En kiu kondiĉo animo sanktigita de vanaj imagoj postmorte vivos kaj moviĝos?

---

---

---

---

4. Kiuj estos la kunuloj de tia animo? \_\_\_\_\_

---

5. Ĉu tia animo povos konversi kun la Profetoj de Dio kaj kun Liaj elektitoj? \_\_\_\_\_

6. Ĉu ni antaŭe jam scias kiel kaj kiam finiĝos nia surtera vivo? \_\_\_\_\_

7. Kion ni povas fari por atingi la eternan vivon destinitan por ni? \_\_\_\_\_

---

---

## SEKCIO 19

‘Abdu’l-Bahá eksplikas:

**“Ĉar la homa spirito, post esti demetinta tiun ĉi fizikan framon, vivas eterne, ĝi sendube, kiel ĉiuj ekzistantaj aferoj, kapablas progresi. Kaj tiel oni preĝu por forpasinta animo ke ĝi avancu, akiru pardonon aŭ fariĝu la ricevanto de diaj favoroj, benoj kaj graco. Pro tio en la preĝoj de Bahá’u’lláh la indulgo kaj pardono de Dio estas petegataj por tiuj, kiuj ascendis al la transa mondo. Krome, ĝuste kiel la homoj bezonas Dion en tiu ĉi mondo, tiel ankaŭ ili Lin bezonas en la venonta. La kreitaĵoj ĉiam estas bezonantaj, kaj Dio ĉiam estas komplete sendependa de ili, ĉu en tiu ĉi mondo aŭ en la mondo venonta.”<sup>26</sup>**

Kial ni preĝu por la animoj de la forpasintoj?

---

---

---

---

---

---

---

---

---

---



## SEKCIO 20

‘Abdu’l-Bahá skribas:

**“Kiam la homa animo forsoros el ĉi tiu efemera polvaro kaj leviĝos al la mondo de Dio, tiam vualoj forfalos kaj veroj eklumos kaj ĉiuj aferoj nesciataj antaŭe klariĝos kaj kaŝitaj veraĵoj estos komprenitaj.**

**Konsideru kiel estaĵo en la mondo de la utero estis surdorela kaj blindokula kaj mutlanga – kiel al ĝi komplete mankis ajnaj perceptoj. Sed kiam el tiu mondo de l’ mallumo ĝi estis pasinta en ĉi tiu mondon de l’ lumo vidis ĝiaj okuloj, aŭdis ĝiaj oreloj, parolis ĝia lango. Same, post kiam ĝi estos el ĉi tiu mortejo hastinta for al la Reĝejo de Dio, estos ĝi naskiĝinta en la spiriton; tiam malfermiĝos la okulo de ĝia percepto, ekaŭdos la orelo de ĝia animo kaj evidentiĝos kaj klariĝos ĉiuj tiu veraĵoj pri kiuj ĝi ne sciis antaŭe.”<sup>27</sup>**

1. Plenigu la spacojn sube:

a. Kiam la homa animo forlasis ĉi tiun mondon

- vualoj \_\_\_\_\_,
- kaj veroj \_\_\_\_\_,
- kaj ĉiuj aferoj nesciataj antaŭe \_\_\_\_\_
- kaj kaŝitaj veraĵoj \_\_\_\_\_.

b. En la mondo de la \_\_\_\_\_ estis ni \_\_\_\_\_ kaj \_\_\_\_\_ kaj \_\_\_\_\_.

c. Kiam ni naskiĝis en ĉi tiun mondon tiam niaj okuloj \_\_\_\_\_, niaj oreloj \_\_\_\_\_, nia lango \_\_\_\_\_.

d. Same, post kiam ni pasos al la Reĝejo de Dio, estos ni \_\_\_\_\_ en la \_\_\_\_\_.

e. Tiam \_\_\_\_\_ la okulo de nia \_\_\_\_\_, \_\_\_\_\_ la orelo de nia \_\_\_\_\_ kaj \_\_\_\_\_ kaj \_\_\_\_\_ ĉiuj tiu \_\_\_\_\_ pri kiuj ni ne sciis antaŭe.

2. Decidu ĉu la sekvaj asertoj ĝustas?

\_\_\_ Kiam ni troviĝas en la mondo de la utero scias ni pri tiu ĉi mondo.

\_\_\_ Nia kondiĉo post la morto estas vero kaŝita por ni en tiu ĉi vivo.

\_\_\_ Horizontoj, komplete novaj, malfermiĝos por ni postmorte.

\_\_\_ Kiam ni mortas ni turniĝas al tiu ĉi mondo por renaskiĝi.

## SEKCIO 21

Bahá'u'lláh diras:

**“Kaj nun rilate vian demandon ĉu homaj animoj post sia separiĝo de la korpo estas plu konsciaj unu pri la alia. Sciu vi ke la animoj de la popolo de Bahá, kiuj estas enirintaj la Karmezinan Arkeon kaj ene de ĝi establiĝis, asociiĝos kaj intime interrilatos unu kun la alia, kaj en siaj vivoj, siaj aspiroj, siaj celoj kaj streboj asociiĝos tiel proksime kvazaŭ ili estas unu animo. Ili efektive estas tiuj boninformitaj, tiuj klarvidaj kaj tiuj dotitaj per kompreno. Tiel estis dekretita de Li, Kiu estas la Ĉio-Scia, la Ĉio-Saĝa.**

**La anoj de la popolo de Bahá, kiuj estas la okupantoj de la Arkeo de Dio, estas, ĉiuj senescepte, tre konsciaj pri la reciproka stato kaj kondiĉo kaj estas unuiĝintaj per la ligoj de intimeco kaj kompaneco. Tia stato tamen devas dependi de ilia kredo kaj ilia konduto. Tiuj de sama nivelo kaj rango estas plene konsciaj pri la reciprokaj kapabloj, karaktero, atingoj kaj meritoj. Tamen, tiuj de pli malalta rango ne kapablas adekvate kompreni la nivelon aŭ estimi la meritojn de tiuj rangantaj super ili. Ĉiu de via Sinjoro ricevos sian porcion. Benita estas tiu homo kiu sian vizaĝon turnis al Dio kaj firme marŝis en Lia amo ĝis kiam lia animo ekflugis al Dio, la Suverena Sinjoro de ĉiuj, la Plej Potenca, la Ĉiam-Pardonanta, la Ĉio-Kompata.”<sup>28</sup>**

1. Ĉu en la sekva mondo ni rekonos personojn, kiujn ni konis en tiu ĉi mondo? \_\_\_\_\_
2. Kiel proksima estos la asociiĝo inter la animoj en la sekva mondo? \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
3. De kio dependos malsamecoj kaj distingo inter la animoj en la sekva mondo?  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
4. Ĉu iu malhavas la gracon de Dio? \_\_\_\_\_

## SEKCIO 22

Bahá'u'lláh admonas nin:

**“Ho miaj servantoj! Ne afliktiĝu, se dum tiuj ĉi tagoj kaj sur tiu ĉi tera grundo io kontraŭa al viaj deziroj estas ordonita kaj manifestita de Dio, ĉar estas certe rezervitaj por vi tagoj de beata ĝojo, de ĉielaj ravoj. Mondoĵ sanktaj kaj spirite gloraj estos senvualigitaj por viaj okuloj. Al vi destinis Li, en tiu ĉi mondo kaj poste, ricevi de iliaj bonaĵoj, partopreni iliajn ĝojojn kaj ekhavi porcion de ilia viviga graco. Ĉion tion sendube atingos vi.”<sup>29</sup>**

1. Decidu kio el la sekva ĝustas?
  - \_\_\_ Ni multe ĉagreniĝu kiam aferoj statas aliel ol ni deziras.
  - \_\_\_ Ĉio, ĉu bona aŭ nebona, estas ordonita de Dio.
  - \_\_\_ Feliĉegaj tagoj atendas nin ĉiujn.
  - \_\_\_ Ni certas ekvidi mondojn sanktajn kaj spirite glorajn.
  - \_\_\_ Estas nia destino ricevi porcion el la benoj de mondoj kiuj estas sanktaj kaj spirite gloraj – kaj en tiu ĉi vivo kaj en la vivo post ĝi.
  
2. Kial ni ne multe ĉagreniĝu kiam aferoj statas aliel ol ni deziras? \_\_\_\_\_
   
\_\_\_\_\_
   
\_\_\_\_\_
   
\_\_\_\_\_
  
3. Kion Bahá'u'lláh promesas al ni en tiu ĉi citaĵo? \_\_\_\_\_
   
\_\_\_\_\_
   
\_\_\_\_\_
   
\_\_\_\_\_

### SEKCIO 23

En tiu ĉi ĉapitro vi pripensis la signifon de la homa vivo. Vi multon lernis pri kio estas la animo, la celo de la vivo en tiu ĉi mondo, la devo evoluigi spiritajn kvalitojn kaj la promesoj faritaj al ni pri eterna vivo, glora kaj plena je ĝojo. En la dua ĉapitro de la libro ni parolis pri duobla destino: alstrebi nian propran spiritan kaj intelektan kreskadon kaj kontribui al la transformado de la socio. Nun eblas reveni al tiu koncepto kaj pensi pri la graveco zorgi pri ambaŭ aspektoj de tiu destino – fone de kion vi ekkonis pri la progreso de la animo. Via pripensado eble profitos el diskutado en via grupo pri la sekvaj temoj.

1. *Evoluigi spiritajn kvalitojn.*
2. *Obei la leĝojn de Dio.*
3. *Kontribui al la bonfarto de la homaro.*
4. *Avanci sur la pado de l' servado.*

## Fontoj

1. El parolado farita la 10an de Novembro 1911, publikigita en *Parizaj Paroladoj de Abdul Baha*, Weinheim 1932, represo Berno 1978; p. 52 (traduko reviziita)
2. El letero datita la 1an de Aprilo 1946 skribita nome de Shoghi Effendi, publikigita en *Lights of Guidance: A Bahá'í Reference File*, Bahá'í Publishing Trust, Nov-Delhio 1988; n-ro 1820, p. 537
3. El letero datita la 28an de Julio 2016 nome de la Universala Domo de Justeco
4. 'Abdu'l-Bahá en *Some Answered Questions*, Bahá'í Publishing, Wilmette 2014, eldono de 2016; n-ro 66:3, p. 352–353
5. Samloke, n-ro 38:5, p. 220
6. El parolado farita la 9an de Novembro 1911, publikigita en *Parizaj Paroladoj de Abdul Baha*, Weinheim 1932, represo Berno 1978; p. 50 (traduko reviziita)
7. El letero datita la 31an de Decembro 1937 skribita nome de Shoghi Effendi, publikigita en *Lights of Guidance*, n-ro 680, p. 204
8. *Gleanings from the Writings of Bahá'u'lláh*, Bahá'í Publishing Trust, Wilmette 1983, eldono de 2017; 82:8, p. 183
9. 'Abdu'l-Bahá en *Some Answered Questions*, n-ro 61:1–2, p. 334
10. *Gleanings*, 80:2, p. 174; ankaŭ en: *Perloj de l' Saĝo. El la Skriboj de Bahá'u'lláh*, Bahaa Esperanto-Ligo, Frankfurto ĉe Majno, 1994, n-ro 25, p. 18 (traduko reviziita)
11. *Gleanings*, 81:1, p. 176
12. *Gleanings*; 165:1–3, p. 391–392
13. Bahá'u'lláh, *La Kaŝitaj Vortoj de Bahá'u'lláh*, Bahaa Esperanto-Ligo, 2009–166 BE; Barcelono, Hispana Bahaa Eldonejo (Editorial Bahá'í de España), araba 32
14. El parolado farita la 6an de Julio 1912, publikita en *The Promulgation of Universal Peace: Talks Delivered by 'Abdu'l-Bahá during His Visit to the United States and Canada in 1912*, Bahá'í Publishing, Wilmette 2012; p. 315–316
15. *Gleanings*, 5:4, p. 8
16. Samloke 82:1, p. 179–180
17. Samloke 153:6, p. 370–371
18. Samloke 27:2, p. 72–73
19. Samloke 27:3, p. 73

20. Samloke 21:1, p. 54–55
21. Samloke 81:1, p. 177
22. Samloke 122:1, p. 293–294
23. Samloke 82:7, p. 182
24. Samloke 81:1, p. 176–177
25. Samloke 125:3, p. 300–301
26. ‘Abdu’l-Bahá en *Some Answered Questions*, n-ro 62:3, p. 340–341
27. *Selections from the Writings of ‘Abdu’l-Bahá*, Bahá’í Publishing, Wilmette 2010, el-dono de 2015; n-ro 149:3–4, p. 246–247
28. *Gleanings*; 86:1–2, p. 192–193
29. Samloke; 153:9, p. 373